

# BULTENO de REU

OFICIALA INFORMILO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO  
№ 99, Oktobro 2018



## Membraro de REU

### Malaperintaj dumvivaj membroj

Nun, en oktobro 2018, ni tenas en la membrolisto 57 dumvivajn membrojn. Sed “tenas” ne identas la vorton “havas”.

Oni fondis “dumvivecon”, sed oni ne pripensis (aŭ pripensis, sed tute forgesis), kion fari kun la homoj, malaperantaj el la movado. Iuj kabeas, iuj transloĝiĝas aŭ trovas sin eksterlande post ŝanĝoj de landlimoj. Do perdas kontaktojn kun esperantistoj de Rusio. Kaj finfine homoj mortas, sed REU pri tio nenion scias.

Do iuj nomoj restas en la listo jardekon post jardeko, eĉ se neni el aktivaj membroj memoras ilin. Kaj devas resti plu kaj plu, ĉar ni ne

rajtas forstreki iun ajn sen klara informo pri ties morto. La Estraro nepre pripensos la decidon, kion fari kun la silentaj animoj. Sed ni bezonas helpon. Bonvolu rigardi al la listo de dumvivaj membroj: ĉu vi scias ion gravan pri iu?

De iuj malaktivuloj estas almenaŭ konataj adresoj aŭ telefonnumeroj. Do estos laboro trovi ĉiujn. Iuj troviĝas en interreto kaj eblas vidi, ke ili almenaŭ vivas. Sed ekzistas homoj, kies nomon konas neni. La aliajn oni memoras sed delonge ne renkontis, kaj ni scias, ke ili devas esti altaĝaj maljunuloj — pri tiaj homoj ne povas ne aperi la demando: ĉu ili vivas...

Kiam mi ekexploris la problemon, evidentiĝis, ke ni preterlasis mortojn de 2 personoj — **Nikolaj Grišin** el Latvio (2015) kaj **Vasilij Grigorenko** el Ukrainio (2016). Nur en tiu ĉi jaro ni fiksas la faktojn en la listo.

Estis ankaŭ bonaj novaĝoj. Estonianoj skribis al mi, ke **Valdemar Kauts**, ankaŭ maljunulo, estas viva. Krome, troviĝis la gazetartikolo, verkita post la letero de Kauts: <https://www.mke.ee/mnenie/chitatel-pochemu-zabolevshikh-vynuzhdavut-zanimatsya-samolecheniem>

### Perditaj moskvanoj

Informo pri Moskvo kaj moskvanoj en interreto sufiĉas. Do en majo mi decidis fari propran esploradon pri moskvanoj. Estas kvar “perditaj” moskvanoj kun kvar diversaj sortoj. Mi volas rakonti pri ili por ke ni vidu, kiel malfacile estos decidi, kion fari kun malaperintaj membroj.

#### Igorj Andrjuŝkin

Per interreto mi trovis la homon kun tiu nomo, kiu naskiĝis en 1977. Sed laŭ reu.ru, Igorj devas esti dumviva jam ekde Sovetia epoko. Ĉu tio eblas, ke 13-jaraĝa knabo membriĝis, aŭ estas iu eraro? Ĉu iu memoras la homon kun tiu nomo?

Mi trovis lian paĝon en VK kaj YouTube. Ŝajne, li estas handikapulo.

En YouTube mi demandis al li, ĉu li estas esperantisto. Li respondis (laŭvorte):

>>Нет!!! Когда- то изучал, но понял, что синтетические языки- утопия. Давно это понял, ещё когда учился на филологическом факультете РПИ им. Иоанна Богослова.


Do, li tamen lernis la lingvon. Pro tio, ŝajne, estas “tiu” Andrjuŝkin. Nu, formale li ne rezignis...

#### Viljam Berdiŝev

Trovi moskvanon kun tia nomo ne estas problemo. Li naskiĝis en 1933... Tiaj homoj kutime longe loĝas laŭ la samaj adresoj, kaj malnovaj telefonnumeroj devas esti aktualaj. Sed se neni dum jaroj aŭdis pri tiel altaĝa maljunulo, jam povis okazi io ajn.

Li estis aktiva en interreto, mi trovas liajn komentojn. Sed ili jam ne estas novaj...

La telefono ne respondis. Eĉ zupon mi ne aŭdis, kvazaŭ la numero apartenas al neni. Do kiam mi en majo estis en Moskvo, mi decidis viziti la korton de la domo, kie Viljam Berdiŝev devas loĝi.



Tie mi trovis lian najbarinon. Ŝi diris, ke bone memoras la homon, li estas ŝia sametaĝano kaj iam helpis ŝin, kiam ŝi rompis la kruron. Sed ŝi ne sciis lian nomon.

Poste la najbarino rakontis, ke ne vidis la najbaron jam dum tri jaroj. Tiam li estis la homo tre maljuna, sed klara cerbe. Sed nun en la loĝejo estas ĝenerala riparo kaj, laŭ ŝia rakonto, oni de tie forĵetis multe da libroj. Kaj nun la loĝejontien vizitas, ŝajne, iu juna parenco... Mi vizitis la etaĝon kaj vidis, ke la sonorilbutono estas rompita kaj la kondukiloj estas distranĉitaj. Eble, la telefono ne funkcias pro la sama kaŭzo.

Do vi komprenas, kion povas signifi ĉio ĉi... Ŝajne, antaŭnelonge Viljam Berdiŝev lasis nian mondon. Tamen ni ne povas tuj oficiale "fiksi" tion. Estas malgranda, sed ŝanco, ke li vivas kaj loĝas en maljunulejo, ĉe parencoj aŭ io simila.

#### **Vladimir Lipec**

En interretaj telefonbazoj troviĝas du moskvanoj kun tiu nomo, sed ambaŭ devas aĝi ĉirkaŭ 90 jarojn! Svetlana Smetanina diris, ke memoras tiun homon, lastfoje ŝi vidis lin antaŭ jam deko da jaroj. Tiam li loĝis ĉe la metrostacio "Jugo-Zapadnaja".

Mi vizitis ankaŭ tiun korton. Sed najbaroj, kiujn mi kaptis, ne konas la personon. Kiam mi provis telefoni, mi eĉ aŭdis karakteran sonoron desupre, kaj la fenestro de (eble) lia loĝejo estis malfermita. Sed telefono ne respondis tiam, nek poste.

#### **Georgij Tujakin**

En interretaj telefonbazoj tute mankas informo pri iu moskvano kun tiu nomo. Sed la nomo estas konata de la movadaj veteranoj, kiuj tamen delonge perdis kontaktojn kun li.

#### **Kion do fari?**

Do estas kvar homoj el la sama urbo. Unu estas viva, sed ne plu estas esperantisto. De du maljunuloj estas konataj adresoj, sed unu el ili, eble, antaŭnelonge forpasis (sed ne estas ĝusta scio), pri la alia estas neniu aktuala informo. Kaj unu homo estas eĉ sen naskiĝdato.

Igorj Andrjuŝkin estas kabeinto. Laŭ reguloj li devas resti dumviva membro. Tio ne estas problemo — nu, estu li. Sed ni havu lian retadreson kaj sendu al li la "Bultenon de REU".

Aktualaj adresoj devas esti postulataj de ĉiu membro. Necesas havi retadresojn, en raraj okazoj — telefonnumerojn kaj/aŭ poŝtadresojn. Kaj ni sendadu la bultenojn al ĉiuj membroj kun adresoj kaj serĉu adresojn, se ni ilin ne havas. Se ni ne decidis alion pri la senaktivaj... Ne necesas ja spami per la bulteno al tiuj, pri kies kabeigo ni scias. Sed en reguloj ne ekzistas iu punkto pri "dumvivaj, sed kabeintaj".

Do ĉu ni devas aparte agnoski, ke s-ro Andrjuŝkin (aŭ iu alia dirinta tion publike) "oficiale" kabeis? Se simple ignori, nenion sendi al tiaj homoj aŭ ne serĉi ilin, do tio signifos, ke REU ignoras siajn principojn, ĉu ne? Kaj se ni eksigos vivan homon el la listo, sed li decidus reveni?

Kion fari kun Tujakin kaj aliaj homoj (rigardu sube), kiujn ne plu eblas trovi, do "malaperintajn senspure"? Mi proponus kelkajn variantojn, sed estas ideoj por pridiskuto inter la estraranoj aŭ dum la Konferenco. Estas kompreno, ke necesas kontroli la dumvivajn, ekzemple ĉiujn 5 jarojn... Kaj ne respondintajn eksigi, sed kun rajto reveni.

Estas ankaŭ la varianto "restigi ĉiujn, se ne estas klara informo". Tamen kiu scias — ĉu ni JAM havas en la listo la homojn, "aĝantajn" 110 jarojn? Formale ni devas ilin teni eĉ dum 300 jaroj, se REU tiam ekzistos.

Ĉu eblas eksigi nun Berdiŝevon kiel mortinton? Aŭ ni, kontraŭe, devas tedi per demandoj la parencojn, kiuj forĵetis eĉ lian telefonon?

#### **Ni bezonas informon!**

La tutan liston vi povas vidi tie ĉi: <http://reu.ru/membrolisto/2018> Se vi scias ion gravan pri iu ajn el la listo, bv. skribi al iu estrarano.

*Precipe estas interesaj sortoj kaj adresoj de jenaj personoj:*

**Aĥmet Gulnara** (Kazaĥio) — informo tute mankas, kazaĥiaj esperantistoj ŝin ne konas.

**Berdiŝev Viljam** (Moskva)

**Ĉerenkova Larisa** (Rjazanskaja obl., Sarajevskij r-n, p/o Sysoj)

**Gluŝik Vladimir** (Ukrainio) — estas ne tre maljuna homo, devas esti viva. Estas trovitaj paĝoj en VK kaj twitter, sed jam forlasitaj.

**Gnedaŝ Nikolaj** (Krasnodarskij kraj, Abinskij r-n, Ĥolmskij-1). Naskiĝis en 1936.

**Kozin Igorj** (Vologda) — informo tute mankas. Troviĝas la paĝo en VK. Sed ĉu estas de li? <https://vk.com/id33976185>

**Laskina Marina** (Tulska obl.)

**Lipec Vladimir** (Moskva)

**Miĥajlov Nikolaj** (Leningradskaja obl.)

**Sapojnikov Aleksandr** (Ivanovskaja obl.)

**Sibircev Vladimir** (Novosibirsk), naskiĝis en 1935.

**Tujakin Georgij** (Moskva)

**Voloŝin Vjaĉeslav** (Ulan-Ude)

**Vulfoviĉ Lev** (Germanio) — devas esti viva, sed mankas iu adreso

Krome, ni petas al aliaj dumvivaj membroj, kiuj ne plu partoprenas renkontiĝojn, sed povis ricevi la Bultenon... Kiel, ekzemple, Rimma Roganova, Zinovij Kurolap k.t.p. Bonvolu skribi pri vi iomete, ĉu vi restas esperantistoj ĝis nun, ĉu interkorespondas aŭ legas esperante.

*Aleksandro Mitin*  
[stephansk@yandex.ru](mailto:stephansk@yandex.ru)

## Esperanto-instruistoj de Rusio Aleksandro Melnikov

**Naskiĝdato:** la 8a de aŭgusto 1951

**Jaro de esperantistiĝo:** 1965

**Loĝloko:** Rostov-na-Donu

**Profesio:** instruisto (instruis fizikon, kemion, biologion, anglan lingvon, Esperanton), sciencisto

**Instruista / sciencista kvalifiko:** doktoro hab. (en la rusia sistemo – doktoro) de filologiaj sciencoj, diplome docento, postene profesoro kaj katedra estro; diplomita Ĉe-instruisto

**La gepatra lingvo:** rusa

**Studitaj fremdaj lingvoj:** angla (pedagogia instituto: 2 jarojn vespere, 3 jarojn koresponde)

**Preferataj aŭ plejofte aplikataj instrumentoj en la kursoj de Esperanto:** miksitaj (kun multaj elementoj de la sugestopedia / Lozanova kaj Ĉe-metodoj)

**Esperantlingva kvalifiko:** membro de la Akademio de Esperanto



**Instruspertoj:** diversnivela Esperanto-kursoj en pluraj urboj de USSR / Rusio kaj en deko da landoj; lekcioj kadre de la Postdiplomaj Interlingvistikaj Kursoj en la Adam Mickiewicz universitato (Poznano, Pollando)

**Instruista kredo:** Por bone digesti sciojn, necesas manĝi ilin kun apetito

**Ŝatataj aforismoj:** De omnibus dubitandum = Dubu pri ĉio; ŝatata aforismo de K. Marx; Fine de ĉiu vojo, se iri ĝin sen retrorigardo, estas sakstrato.

*Profesoro Melnikov afable respondis demandojn de Vladimir Opletajev. Liaj rememoroj pri multjaraj spertoj instrui Esperanton en – kaj eksterlande estas utila informa kaj edifa rakonto ne nur por instruantoj de Esperanto sed ankaŭ por ĉiuj scivolemaj legantoj, kiuj ŝatas legi aŭtentajn materialojn. La mallongigo "E-" en la teksto*

*signifas „io rilata al Esperanto: lingvo, movado, homoj, kutimoj ktp.“*

1) *Aleksandro, vi esperantistiĝis en la tempo de SEJM, kiun oni nun jam preskaŭ katakreze epitetas “glora”, ĉar vere ĝin karakterizas multaj glorindaj agoj de tiutempa juna generacio de esperantistoj por la disvastigo de Esperanto en nia lando. Vi estis komitatano, vicprezidanto, prezidanto de SEJM. Ĉu estis longa via vojo de komencanta adepto de Esperanto ĝis grava movada aktivulo? En kiu momento vi eksentis vin “centprocenta” esperantisto?*

Por oficialuloj mi naskiĝis en 1951. Por mi mem – en 1965. Ja ĝuste tiam mia panjo diris al mi, ke ŝi vidis afiŝon pri Esperanto-kurso. Internacia lingvo – tio estis io stranga, sekve, esplorinda. Strangaĵoj ĉiam ekscitis min; kiel oni diras “similaĵoj allogiĝas”. El pli-malpli 100 ekintoj restis nur du. Unu baldaŭ poste pruvis la faman konkludon de R. Schwartz “edzino – fino!” Por la dua – mi mem – Esperantio fariĝis parto de ... ĉio.

Tio dum ioma tempo eĉ kaŭzis bedaŭron de panjo, ke ŝi malfermis al mi tiun “skatolon de Pandora”. Ja necesis prepari la filon al studentigo, sed li pensas nur pri Esperanto...

Tamen finfine evidentiĝis, ke Esperanto rolis en mia vivo nur pozitive.

Se oni demandas min, kial mi ne forlasis la kurson, mi ne respondos. Mia unua instruisto – Viktor Semjonoviĉ Baranov – estis tre plaĉa persono, sed terura instruisto. Profesia librotenisto, li apenaŭ havis imagon pri instru-metodiko. Sed lia senprofita sindediĉo al Esperanto kaj pure homaj kvalitoj superis liajn kvalifikajn mankojn. Kaj mi sincere dankas lin, ĉar li malfermis al mi vere mirindan eĉ ne landon, sed tutan universon – Esperantion (ja patose, sed vere!).

Gravis, certe, ankaŭ la lingvo mem, kiu ravis min. Kaj la ideo komuniki kun la tuta mondo. Estis tempo, kiam mi korespondis kun samideanoj el duona cento da landoj kaj vizitis poŝtejon ĉiutage! Ĉiuj poŝtistoj konis min. Mi memoras, ke estis okazoj, kiam mi ricevis leterojn kun misa aŭ tute nesufiĉa adreso kaj kiam “onkline Glaŝa” (maljuna poŝtistino, kiu ne povis deĉifri alilingvajn adresojn) konservis plurajn leterojn ĝis mia veno por scii, kien poste direkti ilin.

Tamen la definitiva kapto en la E-retojn okazis dank’al SEJM. Por ĝi min varbis gastinta en Rostovo V. Sibircev. Se mi bone memoras, unuafoje mi riskis veni al SEJT en 1974. La etoso venke ŝokegis min (foresto de hipokriteco, ebleco paroli pri kio ajn, “malstelismo” de E-eminenculoj, kreemo kaj kreivo, bunteco de la programo ktp., ktp.). Kiel tio diferencis de la ordinara vivo kaj ĝiaj amasaj aranĝoj!

Do, en 1975 mi jam estis vicprezidanto de SEJM pri financoj (ŝajne, tion proponis V. Aroloviĉ, al kiu – dankon) poste – la unua vicprezidanto kaj apoteoze – la lasta prezidanto de SEJM, kiu, cetere, aktive partoprenis preparlaborojn por oficialigo de la movado en USSR. Raportoj-informoj (“справки”), ellaborado de la onta statuto kaj alia burokrata laboro abundis. Foje pro ĝi mi renkontiĝis eĉ kun instruktore de la CK KPSU, kio en tiu epoko estis preskaŭ neimagebla honoro.

En 1978, post jaregoj da klopodoj, la sovetia movado iĝis finfine (lasta en la socialisma landaro) oficiale strukturita kaj rekonita: fondiĝis Asocio de Sovetiaj Esperantistoj / ASE. Malgraŭ ĉiuj siaj mankoj, ĉar ĝia kaŝa celo estis ne disvastigi Esperanton, sed bridi kaj “eduki” esperantistojn, ASE pozitive kontribuis al la landa movado. Ne gravas, ke post la fonda konferenco al la partiaj instancoj de la lokoj, el kiuj venis la delegitoj, estis sendita sekreta cirkulero, en kiu estis klare dirite, ke la CK KPSU NE estas interesita je kresk(i)go de la movado.

Ĉi-rilate mi memoras, kiel post la konferenco mi estis vokita al la regiona komsomola komitato, kie instruitoro ŝtelvoĉe demandis min pri plujaj planoj. Sciante de ASE-vicprezidanto pri la cirkulero, mi rapidis trankviligi la burokraton, ŝajne asertante, ke la celo de la kluba laboro estos ne plimultigo de ties membroj, sed ilia eduko. Kiel sereniĝis lia mieno!

Komsomolaj instruitoroj tiel rapide ŝanĝiĝis, cirkuleroj estis tiom multaj, ke baldaŭ tiu direktivo de la CK pasis en Leteon. Sed restis la oficialeco de ASE, kio en tiu epoko estis grava por diversnivelaĵoj oficistoj. Kaj malgraŭ la volo de la CK la movado post 1978 kreskis!

Kaj kio pri la neoficiala SEJM? Ĝi estis likvidita pro la du faktoroj: 1) ĉar ni esperis, ke kun ASE la Esperanto-agado en nia lando plivigliĝos; 2) ĉar daŭra ekzisto de SEJM povus esti traktata kiel ia paralela “kontraŭsovietia” agado. Postfakte la malaperigon de SEJM kritikis pluraj E-aktivuloj, sed mi restas kun la neŝanĝita opinio, ke konfrontado ASE-SEJM apenaŭ donus deziratajn fruktojn.

En la gvidorganojn de ASE trafis pluraj veraj esperantistoj. Mi mem, kiel la iama gvidanto de SEJM, estis malfavorata ĉe la ASE-rilataj oficialuloj, kiuj absolute malprobis mian prezidantecon (almenaŭ tion diris al mi informita kaj fidinda persono), “grince” konsentinte je la estraraneco.

Baldaŭ komenciĝis perestrojko. La jaroj 1986-1991 estis la plej fruktodonaĵoj por la Rostova movado. Ni fariĝis jura persono, kaj en mia laborlibreto aperis enskribajo “la prezidanto de la urba E-klubo”. Jes, mi fariĝis oficiala salajrata klubgvidanto. Tio ebligis al ni havi rondan sigelon kaj konton en banko (gravegaj tiutempaj atributoj). Rezulte ni okazigis du festivalojn de la Esperanto-kulturo kun vendo de niaj koncertoj al la urba parko, kinejo kaj ordinara publiko (en kunlaboro kun la loka filharmonio). Mi aperigis unuajn broŝurojn kaj librojn en aŭ pri Esperanto. Kaj okazis multaj aliaj aferoj, kiuj ne eblus sen nia oficiala statuso.

Poste leviĝis la fera kurteno – kaj mi ekvojaĝis tra la mondo kun diversaj prelegoj kaj Esperanto-kursoj. Hodiaŭ en mia persona mondatlaso estas jam pli ol 50 landoj de ĉiuj kontinentoj. Cetere, prelegado kaj Esperanto-instruado eksterlande finance savis min en la frenezaj 1990-aj.

Kaj kiam mi devis trovi alian laboron, denove helpis Esperanto. E-aranĝon partoprenis profesoro de akademio, kiu serĉis Esperante parolantan kandidaton de sciencoj, ĉar la akademio volis kunlabori kun AIS kaj bezonis Esperanto-instruiston. Mi diris al li, ke mi pretas gvidi Edperanto-kurson senpage, kondiĉe, ke la akademio dungos min kiel instruiston de la angla lingvo. Kaj ĝis la fino de mia karia mi laboris tie kiel docento, poste profesoro kaj fine katedra estro.

Do, mia vivo kaj Esperanto nedisigeble interplektiĝis. Ekde kiu momento? Malfacilas diri. Sed ĉu tio gravas nun?

2) *Ĉu vi memoras vian unuan kurson de Esperanto? Kaj entute kiom da kursogrupoj vi gvidis dum via vivo, se vi povas ilin kalkuli? Eĉ, sen kalkuli viajn sennombrajn prelegvojaĝojn, dumarangajn kaj tendarajn kursojn kaj publikajn provlecionojn, gazetajn kaj televidajn intervjuojn, ĉi tiu nombro devas tut-evidente atesti vian kelkjardekan senlace abnegacian kaj sukcesan instruistan aktivadon.*

Mi bonege memoras la unuan Esperanto-kurson pro kelkaj kialoj.

Unue, tiam mi mem ankoraŭ frekventis mezlernejon, kaj ke mi gvidas rondeton por aliaj lernejoj pufigis mian egoon.

Due, estas konate, ke oni plej bone lernas ... ĝuste instruante. Dank’ al tiu kurso mia lingvonivelo efektive signife kreskis.

Trie, la kvalito de la kurso estis katastrofa, ĉar mi havis nek teoriajn, nek praktikajn spertojn.

Sed mi denove dankas mian unuan instruiston, ke li riskis komisi al mi tion, por kio mi fakte ne havis rajton, sed kio plifirmigis mian esperantistecon. La instruado mem plaĉis al mi kaj helpis trovi mian postan profesionan karieron.

Mi finis mezlernejon kun ora medalo. Inter la favorataj studobjektoj estis la angla. Kaj mi havis strangan penson studi universitate la anglan kaj... hungaran. Kial la hungaran? Mi mem ne scias, eble ĉar Hungario estis bone prezentita en Esperanto.

Sed gravas, ke en Rostovo la sola ebleco studi fremdan lingvon estis ĉe la pedagogia instituto. La ekzemplo de miaj gepatroj, kiuj, laŭ mia ĝisnuna opinio, ja estis bonaj instruistoj, sed ĉiam havis tre modestajn materialajn vivkondiĉojn kaj kies sindikatoj ĉiam estis malpli riĉaj ol tiuj de laboristoj, sciencistoj k.a., inklinigis min ne sekvi ilian vojon.

Do, por la preferata lingvo-kombino sen posta nepra instruisteco restis nur supera lernejo ekster Rostovo. Estante “hejma knabo”, mi ne riskis forlasi la gepatran neston por komenci memstaran vivon, kaj elektis lokan universitaton, kemian fakultaton.

Fininte du jarojn da studado mi komprenis, ke mi nepre devas verki doktoran (niasisteme – kandidatan) disertacion... pri Esperanto. Sed tio ne eblas sen filologia diplomo. Kion fari? Forlasi la universitaton kaj esti tuj enarmeanigita por 2 jaroj aŭ plu studi por ricevi diplomon kaj nur tiam denove ekstudi. Mi elektis la duan varianton kaj ne bedaŭras pri tio.

Unue, al lingvistoj kaj filologoj tre ofte mankas metodoj, logiko ktp. de ekzakt- kaj natur-sciencistoj. Persone al mi la ricevitaj dum la studado “tute flankaj” spertoj helpis ĝuste en lingvistiko.

Due, dank’ al la diplomo mi eklaboris sur posteno, kiu ebligis ĝis certa grado disponi pri la propra tempo, kreumado kaj la dua studado (komence vespere, poste koresponde). La posteno estis en arta fak-lernejo (en la rusa sistemo училище искусств, laŭ la rango egala al t.n. teknikumoj).

Kion faris kemio en la templo de la artoj (konkrete – muziko kaj teatro)? Miaj samaĝuloj, eble, memoras, ke dum certa periodo en Sovetunio estis deviga meza klero. En la fak-lernejo oni rajtis studentiĝi post la 10a klaso (do, kun jama mezlerneja klero) kaj post la 8a. Ĝuste tiuj lastaj fariĝis miaj viktimoj.

Mi bonege komprenis, ke miaj instruoj diferencis de tio, kion mi farus en ĝenerala mezlernejo. Unuavice ili helpu la homojn pensi logike, kapabli ligi premisojn kaj rezultojn, kaŭzojn kaj sekvojn. Gravaj por kemiisto detaloj estis for.

Ĉiam estas homoj, kies cerbo simple ne estas destinita por certaj sciencoj. Por ili mi aplikis jenan principon: se vi ne havas sufiĉajn kapablojn, vi devas iom pli multe labori (konkrete en mia kazo, reaŭskulti miajn klarigojn kaj reskribi kontrolajn laborojn). Finfine mi ĉiam poentumis ĉiujn pozitive, ĉar muzikisto / aktoro aŭ teatrologo ne nepre devas bone kompetenti pri kemio. Gravas, ke ŝli klopodu.

Kio do estis mia granda miro, kiam multajn jarojn poste mi renkontis en parko junulinon kun infano, kiu ridetis al mi kaj diris, ke ŝi memoras miajn lecionojn pri kemio, kaj ke antaŭ ili ŝi havis tre nebulan imagon pri tiu scienco, sed mi forigis tiun nebulon.

Kaj poste alia eksa studento, tiumomente entreprenisto, invitis min al sia kafejo kaj rakontis proksimume la samon, sed kun jena tikla detalo. Foje li fripone iris ekzameniĝi anstataŭ sia amiko. La ekzamenanto rigardis registran kajeron kun notoj pri la frekventado (kaze de la studenta amiko preskaŭ nula, pro kio la instruisto ne memoris, kiel aspektas la vera ekzamenoto) kaj konkludis: pardonu, sed vi tro malofte ĉeestis la lecionojn, tial mi povas poentumi vin nur per 4 (el 5 eblaj).

Mi rimarkis, ke muzikistoj kutime havas pli altajn kapablojn pri lingvoj. Mi aranĝis kurseton, kiun partoprenis deko da personoj. Almenaŭ tri el ili aliĝis al la klubo. Unu (butonakordionisto, kiu loĝas nun en Berlino) restas Esperantisto kaj partoprenas E-aranĝojn ankaŭ hodiaŭ.

Kiam mi estis tentita transoficiĝi al pedagogia instituto kiel t.n. dekano de la fakultato de sociaj profesioj (fakte, evidentiĝis, ke tiu laboro estas socia / senpaga, la vera posteno estis nur “supera laboranto”), kun peno, sed mi sukcesis “trabati” Esperanto-fakon.

Por tiuj, kiuj ne komprenas, pri kio temas. Siatempe estis ideo, ke ĉiu instruisto kapablu gvidi ion eksterklase: lernejan teatron, koruson, sportan sekcion ktp. Moskve surbaze de la profesiaj establoj estis ellaboritaj seriozaj programoj, apenaŭ realigeblaj en ordinaraj pedagogiaj institutoj. Oni postulis, ke ĉiuj studentoj ricevu ian kvalifikon kiel “gvidanto de...”, sed samtempe ne ekzistis devigaj por ili ekzamenoj / studkontrolaj, ne ekzistis etataj instruistoj, nek salajrata posteno de dekano... Estis vere stranga situacio. Mi subskribis oficialan diplomon, kiu rajtigis al homo gvidi ion, ekz., ĉe kulturdomo, sed samtempe... nu, vi legis ĉi-supre.

Se mi bone memoras, en 1974 mi vizitis urban komsomolan komitaton kaj petis ejon por E-klubo (tiutempe la iama klubo ne plu havis kunvenejon kaj fakte ne funkciis). En mia ĉeesto la alparolita funkciulo telefonis al la kulturpalaco “Energetik” (en la centro de la urbo) kaj ili konsentis akcepti nin kondiĉe, ke oficiale ni estos E-klubo de la kulturpalaco. Kompreneble, mi tuj lanĉis Esperanto-kursojn tie.

En 1986 mi maturiĝis efektiviĝi la proprametodan dusemajnan ekspresajon “Instruado – sen turmentado”, post kiu homoj tuj veturis al E-renkontiĝo. Tio estis brilega sperto, ĉar post SEJT ĉiuj brulis je entuziasmo.

Krome, aperis nova leĝo, kiu ebligis fari nian klubon jura persono. Aperis do novaj, neimageblaj antaŭe, eblecoj.

Ĉio estis detruita en 1991. Disfalo de USSR, ekflugo de la prezroj, totala deprimiĝo.

Mi memoras, kiel mi, tiam doktoro de filologiaj sciencoj (niasisteme – kandidato), por gajni iom da mono devis disporti senpagajn katalogojn por kulturaj kaj amasnutraj entreprenoj ŝanĝe je respondoj al merkata demandaro. Pluraj dubis, ke tio estas nur merkatalogia afero, suspektante min je spionado por konkurencoj aŭ impostistoj. Kaj foje mi estis surprizita, kiam homo diris: “Vi ne konas min, sed mi scias, ke vi gvidas E-klubon. Tial mi fidis al vi kaj respondos la demandojn”.

Vi parolas pri “kelkjardeka senlace abnegacia kaj sukcesa instruista aktivado”. Efektive duonjarcenta. Ne ĉiam sukcesa. Kaj ĉiam ajna laciĝa / refreŝiga, ĉar kvankam dum lecionoj / prelegoj mi sentas min enirinta kaĝon kun rabobestoj, de kiuj eblas atendi kian ajn malicaĵon, instruado kaj prelegado estas por mi la plej komfortaj kaj plezurdonaj viveroj.

3) *Vi estas doktoro de filologiaj sciencoj, profesoro, membro de internaciaj sciencaj akademioj, aŭtoro de la eminenta monografio pri kulturologiaj aspektoj de planlingvoj, de multaj sciencaj artikoloj, lernolibroj kaj originalaj popularaj komentarioj verkoj pri Esperanto. Ĉu la akumulita scienca sperto estas nun bazo por viaj superaj kursoj de Esperanto, kiujn vi gvidas en eksterlando?*

Ĉiuj sciencistoj apartenas al la du malsamaj klasoj. Iuj havas teorion antaŭ esploro, ili do serĉas pruvojn, ne malofte neglektante “malhelpajn” por la teorio faktojn. La aliaj analizas abundan faktan materialon kaj nur poste, bazante sin sur la esplorita lingvajaro, hipotezas. Mi apartenas al la duaj. Mi komencis kolekti citaĵojn kun specifaj gramatikaĵoj aŭ leksikaĵoj ankoraŭ en la 1970-aj. Tiutempe mi eĉ imagi ne povis, pri kio mi verkos mian habilitacian disertaĵon. Mi multe legis (entute pli ol 10 mil paĝojn en Esperanto), regule korespondis, instruis, aktive movadumis, ekde 1981 parolis nur Esperante kun mia filino-denaskulino. Unuvorte, mi havis klaran imagon pri tio, kiel oni fakte parolas Esperante, kiujn malfacilaĵojn necesas alfronti kaj kiel “elturniĝi”.

Do, kiel mi jam diris, mi posedis abundan faktan materialon. Sed inter scio de faktoj kaj ilia klarigo kuŝas marĉo, kiu facile povas mortensuĉi vin. Por preventi tion utilas apliki sciencajn principojn kaj metodojn. Ĉi-rilate helpis al mi ne nur lingvistikaj bazoj, sed ankaŭ tiuj, kiujn mi ricevis studente en la kemia fakultato. Kaj mi ĉiam memoras la tri leĝojn de dialektiko, kiujn, ŝajne, oni ne plu nomas leĝoj, sed kies laŭverecon mi multfoje spertis. Cetere, miaj multnombraj kaj diversnaciaj eksterlandaj aŭskultantoj havis apenaŭan imagon pri tiuj leĝoj. Nome, pri unueco kaj ĉiama lukto de maloj, transiro de kvanto al kvalito, pri negado de negado. Kompreneble, ili validas ankaŭ por lingvo.

Resume, kombino de ĝeneralaj scioj, sciencaj bazoj kaj propraj spertoj estas la optimumo por instrui.

4) *Vi regule kunlaboras kun IS (Postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj) de UAM (Universitato “Adam Mickiewicz” en la urbo Poznano, Pollando) kaj apartenas al la internacia instruistaro de la Studoj. Bonvolu rakonti pri viaj sciencaj temoj, kiujn vi kiel lektoro de la Interlingvistikaj Studoj traktas kun diverslandaj studentoj-filologoj kaj lingvistoj.*

Mia ĉeftemo por la kursoj estis ligoj inter la Esperantaj lingvoj kaj kulturo, ĉar ĝuste pri tio temis mia pli ol 600-paĝa ruslingva monografio, en kiu, cetere, mi donis plurajn gravajn difinojn: ekz., tipa esperantisto, kiu poste mi ŝanĝis je pli taŭga tipa Esperanto-kulturano (la difino gravas, ĉar ĝuste tiu tipo estas la ĉefa produktanto / konsumanto de la E-kulturo) kaj interferolekto (varianto de Esperanto, kondiĉita de la domina lingvo, kutime denaska, de Esperantisto).

Ĉiu homo havas plurajn personecojn: psikologian, ideologian ktp. Mi estis la unua kaj, eble, sola, kiu analizis lingvan personecon de tipa Esperanto-kulturano, trovinte komunaĵojn sendepende de ĉefkultura /-lingva aparteno de Esperantistoj.

Kulturaj scioj estas la negenetika memoro de la movad(an)o(j), kiun konservas la lingvo, unuavice per kreo de esperantonimoj (vortoj, kiuj etikedas nure E-kulturaĵojn: ekz., kabei, krokodili, hamburga putĉo, UEA ktp.). Tial mi dediĉis multe da tempo al ili.

Kiel formiĝas esperantonimoj, kial, ekz., samideano estas por t.n. tipa Esperanto-kulturano esperantisto kaj nur poste adepto de sama ideo, al kiuj temoj apartenas esperantonimoj, kiel oni uzas ilin en Esperantaj tekstoj ktp.

Surbaze de miaj esploroj mi eldonis “landografian vortaron de Esperantio”:

Gvidlibro tra Esperantio (konciza leksikono de la Esperanto-kulturo: esperantonimoj, realioj kaj flugilhavaj vortoj). – Rostov-na-Donu / Ростов-на-Дону: Изд-во Мини-Тайп, 2105, 527 с.

Alia temo, pri kiu mi lektiis, estis pragmatiko. Se esti tre konciza: kion homo celas kaj kiel komprenas certajn lingvaĵojn. Ekz., se mi demandas Ĉu vi povas malfermi la fenestron?, ĉu mi efektive dubas pri la ebleco aŭ mi ĝentile petas malfermi?

5) *Via vojaĝemo venigis vin iam en Usonon, kaj vi iĝis konstanta kursgvidanto de NASK - Nordamerika Somera Kursaro, kiu havas nun internacian renomon. Kiujn spertojn de la Esperanto-instruado en NASK vi povus reliefigi? Ĝia kursarano havas ja ankaŭ nemalmultan internacian konsiston, kaj tio postulas de kursestro specifajn alirojn por la efektiviĝo de la interaga parola komunikado.*

Tiu historio estis sufiĉe interesa. Ne pli malfrue ol en 1991 mi proponis min kiel instruiston por NASK. Dum la UK en Bergeno mi gvidis konversacian kurson, kiun vizitis unu el la ŝlosilaj personoj (cetere, postmorte ŝi lasis grandegan kapitalon por ESF kaj la kursaro) C. Schulze. Ŝi vidis min “en la afero” kaj diris, ke persone ŝi inviti ne rajtas, sed ŝi rekomendos min al

respondeculoj, ĉar oficialaĵojn faras universitato. Sed, ŝi avertis, ĝi havas siajn kriteriojn, kiuj povas prokrastigi aŭ tute malebligi mian venon. Nu, mi povis nur atendi. Post ioma tempo mi kun bedaŭro eksciis, ke C. Schulze mortis. Samtempe mortis ankaŭ mia espero veturi al NASK.

10 jarojn poste mi ricevis surprizan demandon el Usono: ĉu vi volas instrui? Nu, klare, ke jes. Sed ĉu oni emas min inviti? Ja dum deko da jaroj mia kandidateco estis neglektata. Eble, io en mia biografio, ekz., ke mi estas ruso, ne plaĉas al la universitatoj (interalie, unu el iliaj kriterioj estis variigo de la nacia konsisto de la instruistaro).

Rezulte, baldaŭ post tio mi estis intervjuata en la Usona ambasado. Juna knabo rigardis la invitilon kaj faris la plej stultan en ĉi-situacio demandon: Ĉu vi posedas Esperanton? (Mi rememorigu, ke en la dokumento, sendita de kolegio, kiu okupiĝas pri interkultura komunikado, estis invito instrui Esperanton!). La knabo esprimis grandan miron, ke Esperanto ankoraŭ vivas kaj ke ekzistas homoj, kiel mi, tamen la vizon donis.

La unua renkontiĝo kun la konstantaj prizorgantoj de la kursoj estis granda ŝoko por mi kaj brazila samideano (Roberto), invitita por la grupo de komencantoj. La instru-postuloj estis tiom altnivelaj kaj diversflankaj, ke la brazilano esprimis sian dubon, ĉu entute necesis veni. Ankaŭ mi interne ekremitis.

Por helpi al la kursanoj trovi la plej taŭgan grupon (depende de sia jama nivelo) al la tria eksterlanda instruisto – hungarino – oni komisiis fari teston. Kiam ŝi publike anoncis la rezultojn, sekvis... riproĉo de la organizantoj. Oni ne rajtas scii, kiun nivelon havas la aliaj (eble, ili hontus, eble ili opinius sian nivelon pli alta). Por mi, hardita en la sovetia etoso, tiaj delikataĵoj estis neglekteblaj, kvankam ili ja ne estas bagatelaj.

La internacieco de la kursoj estas grava trajto. “Subakvaj ŝtonoj” embuskas kaj povas kaŭzi fiefektojn. Ekz., dum la kursaro estis eldonataj informfolioj. En unu el ili estis decidite klarigi kelkajn gestojn. Rimarkinte en la malnetaĵo bildon, kiu montris la eŭropan OK, japano kun terurita mieno petegis ne publikigi ĝin, ĉar en lia kulturo tiu gesto simbolas la virinan organon kaj estas konsiderata maldeca / obscena.

Pli grava surprizo atendis mian brazilan kolegon, kiam li, vidante ĉagrenitan lokan junulinon, volis kuraĝigi ŝin per konsolfrapetoj vange (laŭ mia kompreno, amika gesto en Brazilo, sed ne en Usono kaj, ŝajne, eĉ ne en Rusio). Ŝi eksplodis kaj... la brazilano estis vokita al la estraro de la kolegio. Ĉar la kolegio specialiĝas pri interkultura komunikado kaj diversaj incidentetoj tie okazas relative ofte, ili reagis adekvate. La brazilano ricevis sian porcion da “piloloj” kaj esprimis sian miron. – Por kio ŝi denuncis min al la estroj, ja sufiĉus simpla diro al la kulpinto? – Nu, ankaŭ ni miras. Ke ŝi turnis sin al ni. Kutime oni plendas al polico...

Kiam mi partoprenis la projekton “Indiĝenaj dialogoj”, la organizantoj volis ricevi pritaksojn por eventualaj plibonigoj. Sed en pluraj kulturoj oni neniam konfesos, ke io malplaĉis. Tio, laŭ ili, ofendus la gastigantojn. Kaj kelkaj partoprenintoj el Rusio timis esti sinceraj por ne diri ion, kio povus malutili al ili (rusiana mentaleco). Estis tre malfacile eltrovi la veran opinion.

Dum la sama projekto okazis miskompreno inter latinamerikanoj kaj komi-rusianoj. Tiuj lastaj perceptis troan viglecon, bruon, interrompemon de la temperamentaj sudanoj kiel malestimon kaj rezignis de la diskuto. Eksciinte la kialon, la “kulpintoj” petis pardonon kaj klarigis, ke tio estas kutima maniero diskuti en iliaj landoj. Do, ili ne povis imagi, ke tio ofendus iun. La paco estis reakirita.

Bedaŭrinde, kulturaj diferencoj estas eĉ pli malicaj ol la lingvaj. Parolante fremdan lingvon, oni bone konscias, ke la idiomato estas alia. Sed kulturajoj estas imagataj kiel universaliaj. Kaj oni devas esti tre singardaj por ne ofendi kunparolanton. Precipe se temas pri ŝercoj. Eĉ samkulturanon ne ĉiam disigas laŭvortecon de ŝerco.

Sed ni revenu al NASK. Pasis la unuaj kvin tagoj. Kaj laŭ tradicio, la konstantaj organizantoj de la kursoj invitis nin al ĉiusemajna diskuto pri tio, kion pensas pri ni la instruatoj. Ĉiu rajtis skribi anonime kion ajn. Kaj la organizantoj diris, ke ni ne esperu ne ricevi sian porcion de kritiko. Oni povas malkontenti pri kio ajn: mispronocita R, malbona skribmaniero, aĉa parfumo aŭ malnovmoda pantalonono...

La plej granda viktimo de la kritikantoj iĝis Roberto. Bonega Ĉe-metoda instruisto kaj tre plaĉa homo, li havis nigran strion en NASK. La metodo bezonas minimume 8-personan grupon, ĉar ekde tiom komenciĝas “efekto de amaso”, kiu helpas en lingvolernado. En lia grupo estis nur 4. Dezirinde, ke la grupanoj estu diversaĝaj, -temperamentaj, -kleraj. Liaj instruatoj estis pli malpli samaj. En la metodo tre grava faktoro estas humuro. La grupanoj ne kaptis liajn ŝercojn kaj taksis ilin kiel ofendon.

Ankaŭ mi, kontraŭvole, kontribuis al la kritikoj. Ĉiu el la instruistoj havis propran grupon, sed aldone ni devis fari lecionon aŭ paron da lecionoj en aliaj grupoj. Estante en la grupo de la brazilano, mi instruis la akuzativon uzante la modelon mi ŝatas...-n. Mi montris al ĉiu unuopa homo ĉokoladon kaj demandis: Ĉu vi ŝatas ĉokoladon? Ŝli respondis jes aŭ ne – kaj la tuta grupo komente kantis (melodie de ну почему, почему, почему тот свегофор зеленый) jes ŝatas ŝi / li, ŝatas ŝi / li, ŝatas ŝi / li, ŝi / li ŝatas ĉokoladoN (aŭ la samon en la nega formo). Se oni respondis jes, mi regalis per peco de ĉokolado. Post la leciono ili venis al mi kaj diris: Vi estas bona instruisto, vi regalis nin per ĉokolado, sed Roberto mem manĝis ĉokoladon, klarigante la verbon manĝi. Se mi sciis pli frue...

Kaj ĉu mi tamen malkaŝu, kion riproĉis la kursanoj al mi mem? Kompreneble, estis detaletoj, pri kiuj mi ja konscias: jen mi forgesis skribi la hejman taskon surtabule, jen mi disdonis nekunfiksitaĵojn foliojn (mi dubas, ke iu rusa studento rimarkus tion; cetere, la niaj kutime mem multobligas bezonatajn materialojn proprakoste) k.s. Sed la plej esenca kritiko ŝokis min: Li donas malmulte da hejmaj taskoj. Ĉu vi povas imagi tion buŝe de rusiaj studentoj? Kaj konsideru, ke jam antaŭe mi konvinkiĝis, ke okcidente la homoj venas por lerni (en Rusio – ofte nur por ricevi diplomon). Do, mi havis sufiĉe da hejmtaskoj. Kaj tamen al ili ne sufiĉis!

Fine de la kurso venis la tiama ĉefrespondeculo de ESF pri NASK. Li arigis ĉiujn kursanojn en salono, forpelis la instruistojn kaj aŭskultis opiniojn pri ĉiu el ni. Poste li aliris min kaj diris, ke la homoj bone taksis mian instruadon. Ĉu mi konsentus veni al iu alia NASK? Bonega propono, sed tiutempe mi okupiĝis pri finverkado kaj organizaj aferoj por defendi mian habilitacian



disertaĵon. Do, mi akceptis la proponon, sed nur por iu postdefenda periodo (do, post 2004). Intertempe ŝanĝiĝis la ĉefrespondeculo – kaj la propono estis forgesita. Domaĝe.

6) *Se oni povus viziti vian instruistan metiejon, kiujn metodojn de la Esperanto-instruado, preferatajn de vi, povus sperti viaj kursanoj aŭ viaj kolegoj-instruistoj?*

Unue, necesas konscii, ke neniu metodo taŭgas por ĉiu (kaj – tio gravas! – nek por ĉiu instruisto, nek por ĉiu kursano)!

Due, laŭ mi, instruisto rajtas uzi erojn de diversaj metodoj. Mi multe aplikas Ĉe- kaj Lozanov-trovaĵojn. Oftaj ĥorrespondoj, trompo de kursanoj pri la celoj de diversaj agoj (ili neniam konsciu la veran celon, sed perceptu la ekzercojn kiel ludojn, konkursojn k.s.), multe da gestoj, pantomimaĵoj (kaj de mi kaj de kursanoj), uzo de bildaj serioj (siaspeca teatro en bildoj kun neatendita fino), apliko de “idiotaj” kantetoj (melodie de konataj mulzikaĵoj), ofta ridigo... Gravas, ke homoj aktive partoprenu, ne timu erari, havu eblecon kreumi kaj volu re- kaj reveni.

Lecionoj ĉefe pasas parole, tial mi ĉiam disponigas fine de la lecionoj skribajn materialojn, ĉar ekzistas orel-/okul-homoj, kaj dezirinde, ke ambaŭ havu nutraĵon por lerni.

Trie, ege gravas la etoso. Tial dezirindas, ke la kurso havu iajn ritojn. Ekz., mi komencas lecionojn per diversmaniera ripetado de la slogano *Obstine antaŭen*, la nepoj nin benos, se ni pacience eltenos. Oni povas fari tion flustre, krie, kante, saltante, kiel roboto, kiel knabino, kiel monstro ktp. Komence mi eĉ ne klarigas, kion signifas tiuj vortoj. La homoj simple papagumas. Fine de la kurso ĉiuj scias ĉi-vortojn parkere. Kaj mi spertis, ekz., en NASK, ke miaj grupanoj ekvidinte min, tuj komencis skandi la sloganon. Same okazis en Francio, kiam mi venis al Grezijono post kurseto en alia loko kaj estis renkontita de ridetantaj ekskursanoj, kiuj salutis min ĥore per kriado de nia slogano.

Grava obstaklo por lingvolernantoj estas erarofobio. Tial mi komence de la kurso avertas, ke mi punos tiujn, kiuj ne eraras, ĉar ili superus min, kiu multe eraris kaj –as.

Kvare, la vivo ofte estas malfacila kaj enua, Esperanto kutime ne donas neprajn avantaĝojn en la kariero. Tial do, la lecionoj devas esti iaspeca karnavalo, dum kiu homoj malstreĉiĝu, ne timu montri sin amuzaj, kreumu ktp. Apliku multajn ludojn, ŝercojn, aktoradojn. Primoketu vin mem, ne timu aspekti ridinda! Tio vere interproksimigas la kursanojn kaj instruiston.

7) *La lingvoinstruado de la 21a jarcento draste diferencas de la instrua praktiko de antaŭkvindekjara pasinteco, ĉefe pro la aplikado de modernaj kaj absolute novaj teknikaj instruiloj. Sed kiujn profesiajn ecojn vi dezirus vidi ĉe nunaj junaj kaj novaj instruantoj de Esperanto, tiujn ecojn, kiuj estas apenaŭ anstataŭigeblaj per plej artifikaj instruhelpiloj?*

Se kurso plaĉis al lernantoj, ili rememoros ne teknikaĵojn, sed la instruiston.

La plej gravaj ecoj de ĉiu instruisto estas:

- Amo al la instruata studobjekto kaj al sia laboro; estimo, pacienco kaj toleremo rilate al la lernantoj;
- Profunda sciado (= konstanta lernado) de la instruata objekto;
- Amikemo, helpemo kaj pardonemo rilate al siaj instruatoj, ne postulu de ili tro, neniam ofendu, ĉiam kuraĝigu;

laŭdu ofte (de tempo al tempo mi regalas kursanojn per bombonoj aŭ ĉokolado, iu bagatela Esperanta suvenireto k.s.), mallaŭdu neniam;

- Kreu kondiĉojn, por ke viaj kursanoj povu montri siajn kapablojn ne nur en la lingvo, sed ankaŭ aktore, verkiste, kantiste ktp., eĉ instruiste dum laboro en paroj aŭ grupoj; aliflanke ne timu primoketi vin mem;

- Uzu en viaj lecionoj ambaŭ tipojn de ludoj: kun rivaleco kaj venkintoj aŭ kun stimulo al komuna laboro, kie ne estas (mal)venkintoj;

- Provu fari el viaj kursanoj ne aron da unuopaj homoj, sed kolektivon (iusence nukleon de nova E-klubo);

- Instruante la lingvon, nepre konatigu la homojn kun la Esperanto-kulturo (kaj uzante lingvajn ekzemplojn kun Esperanta kultura fono kaj rakontante pri diversaj facetoj).

*Aleksandro Melnikov, Somero 2018*

## Fakultativa instruado de Esperanto en lernejoj de Rusia Federacio

Oni devas distingi en Rusio inter du grupojn de kursoj: oficialaj kaj neoficialaj. La deviga instruado de Esperanto, kiel parto de ŝtataj instruprogramoj, en Rusio ne ekzistas, kaj la oficialaj kursoj estas organizataj kaj gvidataj kutime sub aŭspicioj de edukaj, sciencaj, kulturklerigaj kaj aliaj institucioj, posedantaj licencon pri edukaj kaj instruaj rajtoj kaj servoj kaj akredititaj ĉe koncernaj departamentoj aŭ ministerioj.

Se Esperanto-kursoj posedas oficialan lernejan aŭ universitatan statuson, iliaj gvidantoj devas havi konfirmitan instruplanon, aprobitan programon, instrumaterialojn (lernolibron), fiksitaĵojn de taksado de lingvokonoj kaj atestado de kursanoj. Al tiu ĉi tipo de kursoj en Rusia Federacio apartenas kutime fakultativaj lernejoj kaj diversgradaj universitataj kursoj, libervole elekteblaj de lernantoj kaj studentoj el akcesora varia t.e. el ne deviga parto de studobjektoj. En Rusio tiaj kursoj povas funkcii ĉe mezaj lernejoj, kolegioj, universitatoj, se estas konsento aŭ permeso de instituciaj aŭtoritatoj, kvalifikitaj instruistoj kaj dezirantoj lerni Esperanton. Kiel ekzemplo de oficialaj universitataj kursoj menciindas la kursoj, gvidataj ekde 2014 de Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova ĉe Rusia universitato de amikeco inter la popoloj (RUDN) en Moskvo. Iliaj kursoj funkcias kadre de akcesora profesia klerigo, kaj post la sukcesa ekzameno la kursfinintoj ricevas universitatajn atestilon aŭ diplomon pri plialtigo de kvalifiko, kio estas oficiala aldonaĵo al la jam ricevita universitata diplomo.

Dum la lastaj dek jaroj trifoje mi gvidis 16-horan lernejan kurson de Esperanto en ordinara meza lernejo al lernantoj de la naŭa klaso. Ili rajtis libervole elekti ĉi tiun lingvan kurson el nedeviga tabelo, kiun konsistigis diverstemaj fakultativaj kursoj: psikologia, komputila, folkloro, teknikaplika ktp. Mia Esperanta instrulaboro estis salajrata kiel kutima laboro de lerneja instruisto. Finintoj de la naŭa klaso en la oficiala ŝtata atestilo pri la meza lerneja ŝtupo havis aldone al la studitaj objektoj ankaŭ noton pri la vizitita kurso de Esperanto.

Lernejoj pordejoj al la fakultativa instruado de Esperanto en nia lando estas malfermitaj kondiĉe, ke estas dezirantoj lerni la lingvon, profesiaj kvalifikitaj instruistoj pretaj gvidi kursojn, kaj lernejestroj konsentas enprogramigi Esperanto-kursojn kaj respondeci pri la nivelo de la instruado. Tion pravas ankaŭ respondo de Departamento de la ŝtata politiko en la sfero de la ĝenerala edukado de la Miniserio de klerigo kaj scienco de RF, direktita al Mikaelo Ĉertilov responde al lia propono enkonduki Esperanton en la instruplanojn.

*Vladimir Opletajev*



**МИНИСТЕРСТВО  
ОБРАЗОВАНИЯ И НАУКИ  
РОССИЙСКОЙ ФЕДЕРАЦИИ  
(МИНОБРНАУКИ РОССИИ)**

Черпилову МК.

**Департамент государственной  
политики в сфере общего  
образования**

Люсиновская ул., д. 51, Москва, 117997.  
Тел. (499) 237-42-44

*19.01.2018* № 08-ПГ-МОН-59219

Уважаемый Михаил Константинович!

Департамент государственной политики в сфере общего образования Минобрнауки России рассмотрел Ваше обращение, поступившее из Федерального агентства по делам Содружества Независимых Государств, соотечественников, проживающих за рубежом, и по международному гуманитарному сотрудничеству, и сообщает.

Образовательная организация обладает автономией, под которой понимается самостоятельность в осуществлении образовательной деятельности, разработке и принятии локальных нормативных актов в соответствии с Федеральным законом, иными нормативными правовыми актами Российской Федерации и уставом образовательной организации.

Образовательные организации свободны в определении содержания образования, выборе учебно-методического обеспечения, образовательных технологий по реализуемым ими образовательным программам в соответствии с федеральными государственными образовательными стандартами начального, основного и среднего общего образования (приказы Минобрнауки России от 6 октября 2009 г. № 373, от 17 декабря 2010 г. № 1897 и от 17 мая 2012 г. № 413) (статья 28 Федерального закона от 29 декабря 2012 г. № 273-ФЗ «Об образовании в Российской Федерации»).


Таким образом, решение об использовании предлагаемого Вами иностранного языка образовательная организация принимает самостоятельно.

Заместитель директора Департамента  
А.А.Копачевская (499) 681-03-87\*4368

И.И.Тараданова



## Novajoj el Birobiĝano



### En la gazetaro

Tre bona artikolo pri Esperanto aperis en birobiĝana gazeto. Pri nia lingvo al korespondanto Anastasia Kurševa rakontis la loka esperantisto Eŭgeno Bojĉin.

Vidu:

[http://www.gazetaeao.ru/esperantida/?fbclid=IwARIYnXwWkeepWX7We0T\\_ho12\\_9TjKmIWG1N5RsMh3KIJOE\\_KfL76wobLrtnc](http://www.gazetaeao.ru/esperantida/?fbclid=IwARIYnXwWkeepWX7We0T_ho12_9TjKmIWG1N5RsMh3KIJOE_KfL76wobLrtnc)

Informis Boris Kolker

### En publikaj kunvenoj

Komence de septembro Eŭgeno Bojĉin faris nelongan raporton pri Esperanto dum kunveno de loka organizo de Rusia Unio de Junularo (PCM = Российский союз молодежи), kie ĉeestis pli ol tridek gejunuloj. Eŭgeno rakontis pri konciza historio de la unika lingvo, montris la avantaĝojn, kiujn donas scio de Esperanto kaj studis kun junaj homoj du lecionojn el lernolibro de A. Junusov. La multaj el ĉeestintoj interesiĝis kaj prenis la adresojn de Esperantaj retpaĝaroj.

Dimanĉe, la 30 de septembro, en la urba biblioteko de Birobiĝano estis la unua kunveno (en ĉi tiu jaro) de literatura klubo "Facetoj" ("Grani") en kadre kiu Eŭgeno Bojĉin rakontis pri Esperanto kaj pri verkistoj en Esperanto. La ĉeestantoj vive reagis al la parolado kaj prenis flugfoliojn kun mallonga gramatiko de Esperanto.

Eŭgeno Bojĉin



## Libroj, kiujn ni legas

Karaj uralaj esperantistoj kaj aliregionaj samlistanoj!

Decembre de 2018 ni celebros la 159-jaran naskiĝdatrevenon de Ludoviko Zamenhof, kiu ekde 1927 estas festata de la tutmonda esperantistaro kiel Zamenhof-tago aŭ Tago de la Esperanta libro.

Omaĝe al ĉi tiu evento aktivaj uralaj partoprenantoj de la internacia legadkonkurso "Esperanto-sumoo" invitas ĉiujn legemulojn partopreni novan regionan retan projekton, okazigotan en oktobro – decembro de 2018. **La projekto titoliĝas "Libroj, kiujn ni legas"**. Ĝi celas inspiri libroŝatantojn al legado de libroj en Esperanto, popularigi interesajn librojn, entuziasmigi legantojn por verkado de komentarioj kaj recenzoj pri legataj aŭ legitaj verkoj.

**Daŭro de la projekto:** 25. oktobro 2018 – 10. decembro 2018.

**Aktivadmaniero:** aperigo de komentarioj aŭ recenzoj pri legitaj Esperantaj libroj en la dissendolisto de ural-siberiaj esperantistoj. Komentario estas aro de rimarkigoj aŭ notoj, klarigantaj tekston aŭ verkon. Komentario klarigas, interpretas, prinotas tekston, recenzas, analizas, kritikis ĝin. Aŭtoro de komentario esprimas sian personan opinion kaj povas prezenti proprajn argumentojn, rezonojn, juĝojn, kritikojn. Recenzo estas mallonga kritika artikolo pri libro, montranta ties kvalitojn kaj mankojn.

Vian tekston vi povas sendi tuj al la dissendolisto, menciante la titolon de la retaktivaĵo "Libroj, kiujn ni legas", aŭ al iu membro de la Gvidanta grupo.

### Aktivula interurba grupo, gvidanta la projekton:

- Raja Kudrjavceva (Jekaterinburgo), [komencanto.r66@ya.ru](mailto:komencanto.r66@ya.ru)
- Lidija Jerofjeva (Nijnij-Tagilo), [lidaero@mail.ru](mailto:lidaero@mail.ru)
- Vladimir Opletajev (Surguto), [surborde@mail.ru](mailto:surborde@mail.ru)
- Olga Ŝilajeva (Glazovo), [elka\\_shilyaeva@mail.ru](mailto:elka_shilyaeva@mail.ru)
- Sergej Kumkov (Jekaterinburgo), [sskumk@gmail.com](mailto:sskumk@gmail.com)
- Pavel Veselov (Tjumenjo) [pav.tmn@gmail.com](mailto:pav.tmn@gmail.com)

**Rezultoj de la projekto :** Post la 10-a de decembro 2018 la Gvidanta grupo per sekreta balotado elektos 7 plej interesajn recenzojn kaj komentariojn publikigindajn en la paĝaro "Ural-Siberia esperantista movado". La nomoj de ĉiuj sep aŭtoroj estos anoncitaj la 15an de decembro 2018. Ili estos premiitaj per diplomoj kaj librodonaĵoj.



### Bazaj kriterioj por prijuĝi recenzojn kaj komentariojn:

- kolofono de recenzata libro;
- prezentado de la enhavo (temo, ideoj, peripetioj ktp.) de verko;
- prezentado de la aŭtoro;
- propra opinio de recenzanto pri legita libro;
- rekomendoj kaj sugestoj al legantoj.

Vasilij Rozanov, rusa filozofo kaj literaturisto, konvinkite asertis: "Necesas legi nek por plezuro nek por informiĝo, sed nur por ŝanĝo de la animo". Ni provu tamen en la sekvaj du monatoj legi kaj por plezuro, kaj por informiĝo kaj ankaŭ por memevoluo. Multajn sukcesojn al ĉiuj librolegantoj!

Raja Kudrjavceva

## “Lokalizu” — la superprojekto de MEA MASI

“Lokalizu” estas projekto por tradukado de fakaj tekstoj kun uzo de Esperanto kiel pontolingvo.

Ĝi ne similas jam ekzistantajn aŭ iam ekzistantajn projektojn. Ne temas pri maŝina tradukado. Ne temas pri volontula tempopasigo. Ne temas pri senpaga malŝparo de tradukkapabloj kaj tempo. Temas pri serioza ampleksa entrepreno kun profesiaj tradukistoj, kiu ebligas por mendantoj kontraŭ modera pago ricevi bonkvalitajn tradukojn samtempe al kelkaj plej necesaj lingvoj kaj por esperantistoj – ricevi monon pro sia traduklaborado.

La 10-an de septembro en Moskvon venis ĉina esperantisto entreprenisto Zhang Long (konata en Esperantujo kiel Urso). Li tre interesiĝis pri nova projekto de MEA MASI “Lokalizu”. Pro tio en traduk-oficejo “Lingvokonekt”, gvidata de Arina Osipova kaj Oleg Ĉajka, okazis kunveno de “Lokalizu”, kiun partoprenis 11 homoj, 5 el ili per interreto.

Tio estis jam la dua kunveno, dum kiu interesitoj pridiskutis la projekton, eldiris siajn opiniojn kaj planojn pri ĝi, interŝanĝis novaĵojn kaj rakontis, kiu kion jam faris por progresigi la projekton.

Ĉiujn entuziasmigis la rakonto de Zhang Long pri lia persona sperto traduki pere de Esperanto por la kontrakto de lia firmao kun la mondrenoma energiprodukta kompanio “Gazprom”. Li faris la tradukon el la rusa al la ĉina lingvo pere de Esperanto kun helpo de rusa esperantisto Stanislav Belov (u. Tjumenjo). La laboro estis farita laŭ la metodo, simila al tiu, sur kiu baziĝas la projekto “Lokalizu”, kaj ĝi funkciis tre bone. La metodo taŭgas ĝuste por tradukado de teknikaj tekstoj, riĉaj je faka leksiko.

Aliflanke, la programisto el Sankt-Peterburgo Ilja Muravjov (MEA MASI) rakontis pri la sperto de la tutmonda merkata interretspaco Aliexpress, kiu traktis eblon de bonkvalita nemaŝina tradukado al multaj lingvoj por sia merkatretejo. La entrepreno rifuzis de homa laboro, ĉar konstatis, ke kvalito de maŝina tradukado estas sufiĉa por la klientoj kaj alia varianto ne kompensas la elspezojn.

Multajn valorajn kompetentajn rimarkojn donis profesia tradukisto el Jekaterinburgo lingvisto Andreo Peĉonkin, kiu priskribis la nunan staton de tradukebloj kaj bezonoj kaj rakontis pri la plej aktualaj metodoj de tradukado en la mondo. Liajn demandojn, dubojn, meditojn kaj proponojn riĉe kontribuis lingvistoj kaj tradukistoj Sergeo Straŝnenko (u. Rigo) kaj Oleg Ĉajka (u. Moskvo, MEA MASI).

La kunveno metis multajn demandojn kaj solvendajn problemojn, sed ne malentuziasmigis la iniciintojn.

Nun la plej aktuala tasko de la projekto estas trovi altkvalitajn tradukistojn el Esperanto al sia nacia lingvo (la angla, germana, franca, hispana, araba kaj ĉina). Nur post kompilo de tia tradukista teamo eblas fari eksperimentajn tradukojn, enkadre de la moskva tardukfirmao “Lingvokonekt”, kiun estras esperantistoj-masianoj. Interesitoj pri kunlaboro estas atendataj!

Spektu la esperantan animacian filmon pri la projekto “Lokalizu” kaj legu la detalan informon pri ĝi en la paĝaro [LOKALIZU.COM](http://LOKALIZU.COM). Interesitoj aliĝu al la grupo [fb.com/groups/lokalizu](https://fb.com/groups/lokalizu). Kunlaborantoj turnu sin al [kilokaban@yandex.ru](mailto:kilokaban@yandex.ru); +7-901-5849604.

Aleksandr Basov,  
iniciinto de “Lokalizu”, MEA MASI (Moskvo)



### MER-14

La 16-an de septembro en hejmo de Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova okazis la 14-a Moskva Esperanto-renkontiĝo – organizata de ili ĉiusezonsa aranĝo. Ĉeestis 14 personoj. Estis rakontoj pri la someraj aranĝoj (Lisbona UK, Ŝuja RET), prelego de Nikolao Gudskov pri hejmaj mamuloj, prezento far Valentin Melnikov de lia honore menciita en Belarta Konkurso monologo “Ne juĝu...”, prezentoj de komencantaj lernantoj de Dima kaj Anjo kaj koncerto de Mikaelo

Povorin. Necesas speciale noti la elstaran kuirarton de Anjo.

## Renkontiĝoj

## Novaj libroj



### Reeldono de historia esploro

Ĝus estas liverita el eldonejo aldona reeldono de la ruslingva verko “Esperanto-movado en Norda-Okcidenta eŭropa parto de Ruslando”, unue eldonita libroforme en 2014. La libro enhavas 160 paĝojn kun fotoj de nekonataj kaj famaj esperantistoj. En la verko estas biografioj de la sekvaj personoj: Petr Gavrilov, Gennadij Dehteriov, Luĉmila Jevseieva, Aleksandr kaj Ludmila Eriuhin-oi, Abram Klimovskii, Aleksandr Logvin, Veniamin Mahover, Revolt Pimenov, Semjon Podkaminer, Antanas Poška, Henrik Seppik, Aleksei Sitkarjov, Natan Futerfas, Riĉard Civinski, Nikolaj Sveŝnikov. La libro kosta 350 rublojn inkluzive sendokoston.

La mendojn sendu laŭ la adreso: [anasido@gmail.com](mailto:anasido@gmail.com)

Anatolo Sidorov.



La 4-an de novembro al la elstara taŝkenta esperantisto Eŭgeno Perevertajlo (1938-2012) plenumiĝus 80 jaroj. Okaze de la venanta jubileo ni publikigas artikolon de Gafur Mirzo, prezidanto de Uzbekia Esperanto-Asocio.

PRI LA BRILA STELO

Antaŭ tridek jaroj, se diri pli ĝuste en la 1987 j., mi vizitis Taŝkentan Domon de Sciencistoj por lerni la francan lingvon. Trairinte la koridoron mi hazarde malfermis jam iom malfermitan pordon de unu ĉambro. La ĉambro estis plena je ĝelernantoj. Mi tuj petis pardonon de la instruisto kaj diris ke mi serĉas ĉambron de la franca lingvo. Li gaje sciigis min ke en tiu ĉi ĉambro oni lernas alian lingvon kaj proponis ankaŭ min eniri. Mi iom hezite eniris kaj tuj atente aŭskultis la lecionon. Tiumomente mi sentis min en tuta alia, tute nekonata por mi ĝis tiam stranga sed ege afabla situo. Ŝajnis al mi ke mi songas kaj sentas min en tute alia ege agrabla mondo. Tiu leciono estis mia unua E-leciono kaj

tiu hazarde trovita instruisto estis ekde tiu tago mia dumviva plej kara amiko-konsilinto estimata E. S. Perevertajlo. Jes, li estis vere brila stelo en Esperantujo. Li estis fidela amiko, fama fakulo, sperta pedagogo, sindonema kaj senlaca motoro en nia landa E-movado. Mi estas ege feliĉa lerninta la lingvon de li mem kaj longdaŭre laborinte kun li kune en tiu kampo.

Mi bone konis lin mem, lian modestan vivmanieron, lian familion, aliajn geamikojn kaj ĉiujn liajn disĉiplojn. Li estis dediĉinta sian tutan vivon nur por Esperanto. Alian vivon li ne sciis. Ŝajnas al mi ke li eĉ songis Esperante. Li ĝis la fino de sia senplena vivo ne ĉesis sian verdan agadon kaj neniam diris ke li estas laca. Krom la aferoj de Taŝkenta E-Klubo li ĉiam trovis pliajn E-zorgojn.

Li multfoje subite telefonis al mi kaj ĉiam diris "... jen, mi trovis novan ejon por propagandi kaj instrui E-on" kaj iufoje petis min helpi lin instrui Esperanton kaj reklami la agadon en la gazetaro. Mi, uzinte mian tiaman postenon de ĉefredaktoro en la Ŝtata Teleradiokompanio, tuj preparis iun teleprezentadon. Tio okazis ofte kiam alvenis iu el niaj eksterlandaj samideanoj. Mi kun mia estimata instruisto multfoje faris ege interesajn kaj allogajn teleprogramojn.

Kion mi sukcesis en mia verda vivo, ĉio estis danke al mia senŝanĝigebla kaj karega por mi HOMO, jes vere kun la grandaj literoj (jes, li plenmeritis tion) kies nomo estis EUGENO!

Li ĉiam revis fondi nian landan E-Asocieton sed bedaŭrinde

ne sukcesis efektiviĝi tion. Ni kune kelkfoje provis, penis, strebis. Sed ĉio

estis vane. Tiutempe vere estis malfacile efektiviĝi ion novan. Jen, dank' al dio venis la tempo kiun revis li kaj aliaj niaj antaŭaj samlandaj gesamidenoj. Estas feliĉe, ke antaŭendone jam estis oficiale registrita nia landa Esperanto-Asocio de kiu ĉeffondinto estas lia disĉiplo. Certe tiu disĉiplo estas mi mem, nuntempa prezidanto de UzEA kaj mi fier-as kaj -os ĉiam ke mi estas disĉiplo de la supermenciata brila stelo en la Esperanta Mondo, kies nomo estis PEREVERTAJLO Evgenij Sergeevič. Kun ĉiama verda, kara kaj brila memoro

Gafur Mirzo, Taŝkento, Uzbekio

Advertisement for 'INVITO AL ESPERANTO' featuring a drawing of children holding signs and the text 'E. S. Perevertajlo'.

Large advertisement for 'KVI - НА СЦЕНЕ СТОЛИЧНОГО ТЕАТРА' (KVI - ON THE STAGE OF THE CAPITAL THEATRE) with a photo of Evgenij Perevertajlo and various text blocks.

## Katalogo de rusiaj Esperanto-lerniloj, verkitaj, eldonitaj, enretigitaj en RSFSR kaj Rusio ekde 1957

Unu el la decidoj de la Instruista seminario de RET-2018 estas pretigo de katalogo de rusiaj lerniloj de Esperanto. La ideo devenas de al Irina Gončarova. Al la kategorio de lerniloj apartenas dulingvaj lernolibroj de Esperanto, lernolibroj en Esperanto, gramatikaj informiloj, instruaj legolibroj, helpiloj, man- kaj gvidlibroj por instruantoj de Esperanto inkluzive de tradiciaj paperaj eldonaĵoj kaj de enretigitaj bitkursoj.

Oni ofte plendas pri manko de modernaj lernolibroj de Esperanto, pri neeble trovi taŭgan lernilon por ruse parolantaj kursanoj ktp. Sed reale preskaŭ ĉiujare aperas novaj kursoj de Esperanto, estas reeldonataj ekzistantaj lernolibroj kaj enretigitaj aŭtoraj kursoj de rusiaj instruantoj de Esperanto. Iufoje oni povas aŭdi alvokojn verki praktikajn helpilojn por instrui Esperanton. Nun estas akireblaj manlibroj de ILEI por Esperanto-instruistoj, sed ankaŭ en Rusio ekzistas tre bona didaktika instruhelpilo “Instruado sen turmentado” de profesoro A.S. Melnikov, eldonita en 1999 por profesiaj kaj amatoraj Esperanto-instruantoj. Evidente mankas informoj pri haveblaj aŭ iam aperigitaj lernolibroj kaj kursoj. La projekto “Katalogo” celas likvidi ĉi tiun informan truon.

Mi kunordigos la projekton “Katalogo” en 2018 – 2019 kaj pretas publikigi en ĉiu nova “Bulteno de REU” referencojn pri kelkaj Esperanto-lerniloj. La publikaĵoj dume ne estos sistemitaj laŭ eldonjaroj aŭ aŭtoroj, ĉar unuaperiode gravas, ke iu lernilo estu nepre menciita kaj trafu la katalogan liston. Unuvorte, necesas krei datumbazon. Mi tre esperas afablan kunlaboron de nunaj rusiaj aŭtoroj kaj spertaj kursgvidantoj pri enlistigo de lerniloj, verkitaj eldonitaj, enretigitaj en RSFSR kaj Rusio ekde 1957. Helpo de ĉiuj aliaj interesitaj personoj en formo de korektoj, komentoj, ĝustigoj estas ankaŭ bonvena. Se iu opinias, ke temas pri deko da libretoj, tiu eraras: nur la populara lernolibro de Abdurahman Junusov spertis jam kvar eldonojn, “Mamutido Miĉjo” de Mikaelo Bronŝtejn havas tri eldonojn. Apenaŭ eblas kalkuli, kiom da eldonoj posedas la fama kurso de Boris Kolker “Esperanto en 20 lecionoj”, verkita de li en la periodo de la sovetia samizdata epoko.

En la kataloga listo ĉiu libro resp. kurso havas jenajn datumojn:

- 1) aŭtoro;
- 2) titolo (kun ISBN aŭ almenaŭ kun biblioteka kataloga identiga numero, se ili estas);
- 3) eldonejo, urbo;
- 4) eldonjaro;
- 5) eldonkvanto;
- 6) nombro de paĝoj;
- 7) mallonga referenca noto;
- 8) reta ligilo (por bitversioj de lerniloj aŭ por enretigitaj Esperanto-kursoj).

Vladimir Opletajev

N <sup>o</sup>	Aŭtoro	Titolo	Eldonejo, urbo	Eldon- jaro	Eldon- kvanto	Nombro de paĝoj	Mallonga referenca noto	Bitversio, reta ligilo
1	Л. Заменгоф	«Международный язык. Предисловие и полный учебник. Д-р Эсперанто». 4-е издание. ISBN 978-5-7161-0165-4 Faksimila reproduktaĵo.	“Impeto”, Moskvo	2007	500	40	Antaŭparolo kaj plena lernolibro de la Internacia lingvo de doktoro Zamenhof. Reprintaĵo de la unua eldono.	
2	Л.Л. Заменгоф	“Основы международного языка эсперанто” (Fundamento de la internacia lingvo Esperanto) Faksimila reproduktaĵo. ISBN 978-5-7161-0233-0	“Impeto”, Moskvo	2011	500	112	Represo de la 2-a eldono de “Posrednik”, 1911. Al la centjarigo de la 2-a eldono en la eldonejo “Posrednik”. Ruslingva parto de “Fundamento de Esperanto” kun gramatiko, vortaro, universala vortaro.	
3	И.В. Сергеев (Иван Владимирович Сергеев)	«ОСНОВЫ ЭСПЕРАНТО»	Издательство Института международных отношений, Москва	1961	-	128	Gramatika informilo pri Esperanto en la rusa lingvo kaj suplemento kun tekstoj, Esperanta – rusa kaj rusa – Esperanta vortaretoj.	
4	Андреев Н.Д. (Николай Дмитриевич Андреев)	«Международный вспомогательный язык эсперанто. Краткая грамматика и словарь-минимум»	Общество по распространению политических и научных знаний РСФСР, Ленинград-ское. отделение, Ленинград	1957	95000	46	Ruslingva informilo pri Esperanto kun konciza gramatiko kaj vortareto.	
5	М.И. Исаев (Магомед Измаилович)	«Язык эсперанто» <a href="#">И4602010000-131</a> 013(02)83	Издательство «Наука». Главная	1983	500	88	Informilo pri la Esperanta gramatiko kaj esperantista movado kun	

	Исаев)		редакция восточной литературы, Москва				mallonga literatura suplemento kaj Esperanta-rusa vortareto.	
6	З.В. Семёнова, М.И. Исаев (Зинаида Васильевна Семёнова, Магомет Измаилович Исаев)	«Учебник языка ЭСПЕРАНТО» С4602010000-205 013-(02)-84	Издатель-ство «Наука». Главная редакция восточной литературы, Москва	1984	30000	264	25-leciona baza kurso de Esperanto kun ampleksa gramatika suplemento kaj krestomatiaj, Esperanta – rusa kaj rusa – Esperanta vortaretoj, kelkaj ilustraĵoj el bildvortaro.	<a href="http://padabum.com/d.php?id=183930">http:// padab um.co m/d.ph p?id=1 83930</a>
7	Борис Колкер (Борис Григорьевич Колкер)	«Международный язык эсперанто: полный учебник. Internacia lingvo Esperanto: plena lernolibro» ISBN 978-5-7161-0172-2	“Impeto”, Moskvo	2012	1000	264	Klasika 20-leciona baza kurso de Esperanto en la rusa lingvo kun Esperanta – rusa vortareto, ŝlosiloj por ekzercoj kaj traduktaj taskoj, literatura suplemento kaj ruslingva alfabeto indekso, verkita de Anna kaj Mati Pentus.	<a href="https://profilib.org/content/146013/boris-kolker-uchebnik-yazyka-esperanto-osnovnoy-kurs.php">https:// profili b.org/c htenie/ 14601 3/boris - kolker - ucheb nik- yazyka - espera nto- osnov noy- kurs.p hp</a>
8	Boris Kolker (Борис Григорьевич Колкер)	“Vojaĝo en Esperanto- lando. Perfektiga kurso de Esperanto” ISBN 5-01-002953-7	Eldona grupo “Progress” (“Junior”) Moskvo	1992	4000	344	26-leciona perfektiga kurso de Esperanto, celanta perfektigi lingvokonajn, enkondi studentojn en Esperanto-kulturon.	
9	Б.Г. Колкер (Борис Григорьевич Колкер)	«Учебник языка эсперанто. Основной курс» ISBN 5-02-017-112-3	Издатель-ство «Наука». Главная редакция восточной литературы, Москва	1992	10500	160	20-leciona baza kurso de Esperanto en la rusa lingvo kun Esperanta – rusa vortareto, ŝlosiloj por ekzercoj kaj traduktaj taskoj.	<a href="https://royalib.com/read/colker/uchebnik_yazyka_esperanto.html#0">https:// royali b.com/ read/k olker_ b/uche bnik_y azyka_ espera nto.ht ml#0</a>
10	Б. Г. Колкер	Методические разработки по международному языку эсперанто для курсов	Уфим. клуб Эсперанто	1979	1000	93	Kurso, plurfoje “samizdate” represita en postaj 10 jaroj en pluraj lokoj.	
11	Борис Колкер (Борис Григорьевич Колкер)	«ЭСПЕРАНТО в двадцати уроках» (Методические разработки для изучения международного вспомогательного языка эсперанто на курсах Уфимского клуба)	Юргинский клуб эсперанто	1980	-	90	20-leciona baza kurso de Esperanto en la rusa lingvo kun gramatika suplemento.	
12	Б.Г. Колкер (Борис Григорьевич Колкер)	Эсперанто за 16 дней	Уфа	1990	3000	16	Kolektita en broŝuron kurso "Эсперанто для химиков", aperinta en la scienc-populara revuo "Химия и жизнь " en 1982	

Por ĉi tiu parto de la katalogo (1 – 12) kunlaboris Vladimir Opletajev, Nikolaj Gudskov.



## La unuan fojon en Rusio! Parola KER-sesio per skajpo!

La 7 – an de aprilo 2019 jaro en Moskvo la unuan fojon en Rusio okazos la skajpa parolekzameno por dezirontoj ekzameniĝi en la niveloj B1, B2, C1. La ekzamenon akceptos du alilandaj esperantistoj el malsamaj landoj. La unua provo montros, ĉu eblas organizi serion de malĉeestaj parolsesioj en nia grandega lando. Aliĝi eblas en la paĝaro [www.edukado.net](http://www.edukado.net).

La limdato por aliĝo estas la 7 de marto 2019 j. Por konsultoj, demandoj bonvolu turni vin al Irina Gonĉarova: [mirinda.strigo@gmail.com](mailto:mirinda.strigo@gmail.com) aŭ Svetlana Smetanina: [svsmetanina@yandex.ru](mailto:svsmetanina@yandex.ru)  
Bonvenon al la parola sesio, kie vi montros viajn sciojn kaj kapablojn!

*S. Smetanina  
ĉeforganizanto de KER-sesioj en Rusio*

## *Fondusoj*

### *Memorigo post unu jaro:*

### **REU establis la fonduson «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev»!**

Laboro pri vortaro estas malfacila tasko, kiu postulas multajn fortojn kaj monelspezojn. Dum longaj jaroj Boris Kondratjev kun nemultaj helpantoj abnegacie faras tian laboron, kreante plej uzatan hodiaŭ Esperanto-rusan kaj rusan-Esperantan vortaron (<http://eoru.ru>, <http://rueo.ru>).

Ni proponas subteni ilian laboron pri la vortaro kaj pri ĝia paĝaro kaj establas fonduson por tio.

Vi povas donaci kiom vi volas, ekzemple 10, 100, 1000 rublojn, aŭ iun alian sumon, kiu ne estos tro peza por via monujo.

El multaj donacoj kunmetiĝos forta subteno. Aliĝu ankaŭ vi!

Kolektatan monon ni regule sendados al la teamo de Boris Kondratjev.

La nomojn de donacintoj ni planas regule publikigi en «Novaĵoj» en la REU-paĝaro (<http://reu.ru/informoj/eo>).

Viajn mondonacojn ĝiru al la kasisto de REU.

Post la ĝiro nepre skribu al la kasisto retpoŝt- aŭ SMS-mesaĝon, en kiu indiku, kiu vi estas kaj ke vi ĝiris monon en la fonduson por Kondratjev-vortaro.

Pagmanieroj kaj kontaktoj de la kasisto vidu ĉe

[http://reu.ru/paghoj/pagmanieroj\\_eo.html](http://reu.ru/paghoj/pagmanieroj_eo.html).

Provizoran regularon pri la Fonduso vi povas elŝuti ĉe

[http://reu.ru/prenu/regularo\\_pri\\_kondratjev\\_fonduso.pdf](http://reu.ru/prenu/regularo_pri_kondratjev_fonduso.pdf).

Teksto de tiu ĉi novaĵo ĉe reu.ru: <http://reu.ru/informoj/eo/231>;

ruse: <http://reu.ru/informoj/ru/232>



### **Provizora regularo pri la fonduso de REU «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev»**

*La regularo devas esti aprobita aŭ abolita de sekva Konferenco de REU. Ĝis tiu okazo la Estraro provizore uzas ĝin por kuranta agado.*

1. La fonduso de REU «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev» (plue — la Fonduso, la Vortaro) estis establita de la 29-a Konferenco de REU (06.-07.08.2017, urbo Poŝehonjo).
2. Celo de la Fonduso — monhelpi al la teamo de la Vortaro en ĝia laboro pri la Vortaro kaj pri la paĝaro de la Vortaro. La monhelpo okazas per akumulado de mondonacoj.
3. La Fonduso ne estas uzebla por aliaj celoj.
4. La Fonduso pleniĝas per donacoj de apartaj esperantistoj, Esperanto-organizaĵoj, ceteraj simpatiantaj personoj.
5. Listoj de kontribuintoj al la Fonduso estas regule publikigataj en la paĝaro de REU kaj en la Bulteno de REU.
6. Donaco al la Fonduso fareblas per pago al kasisto de REU. Paganto devas nepre informi la kasiston, ke la pago destinitas al la Fonduso.
7. REU regule transdonas la tutan akumulitan en la Fonduso monon al la teamo de la Vortaro (ne malpli ofte ol ĉiun duonjaron, escepte de okazoj, kiam sumo en la Fonduso estas nula). La transdono okazas per ĝiro laŭ monsubtenaj pagmanieroj, indikitaj en la paĝaro de la Vortaro.
8. La Fonduso povas esti malfondita per decido de la Konferenco de REU aŭ per decido de la Estraro de REU, aprobita de la Konferenco de REU.

## *Gastoj de REU*

### **Turneo de Françoise Noireau tra Rusio**

Inter la 13 de septembro kaj la 11 de oktobro 2018 jaro en Rusio gastis franca esperantistino, psikopedagogo, amatora violonistino Françoise Noireau. Laŭ invito de REU ŝi vizitis la urbojn Barnaulo, Novosibirsko, Jekaterinburgo, Krasnojarsko, Kazano, Ĉeboksaro, Moskvo kaj Sankt-Peterburgo. En ĉiuj urboj nialandaj esperantistoj ege kortuŝe, amikeme kaj tutanime akceptis ŝin, organizis diversajn aktivajn vizitojn, renkontojn, ekskursojn, koncertojn, elpaŝojn, lecionojn k.a. Nia gastino rakontis pri Francio, sia bela regiono, pedagogia sperto pri edukado de denaskuloj, paroligis france kaj Esperante diversan publikon: de infanoj ĝis plenkreskuloj, organizis ludojn. Ŝi lerte dancigis la publikon en kafejoj, lernejoj, klubejoj kaj kun sincera amo violonludis melodiojn de diversaj mondopartoj.

Fr. Noireau ĝuis hejman atmosferon, bongustajn manĝojn, veran gastamon de niaj homoj, longan trasiberian fervojon, koncertojn kaj klubkunvenojn, multflankajn talentojn de nia popolo.

Ĉi tie mi volas esprimi koran dankon al la organizantoj, gastigantoj, ĉiĉeronoj, helpantoj, akompanantoj, ĉiuj esperantistoj, kiuj estis engaĝitaj en tiun nefacilan laboron!

Mi menciu laŭ la urboj: Ikar Akimenko kaj lia edzino Alona; Novosibirsko: Katerina Arbekova; Jekaterinburgo: Raja Kudrjavceva, Rita Husanova, Sergej Kumkov; Krasnojarsko: Vladimir Sapojnikov, Eleha Ŝaravina, Sergej Ĵilejkin, Evelina Sokolova; Kazano: Ildar Kijamov, Ekaterina Ŝatrova, Aleksej Sabirov; Ĉeboksaro: Aleksandr Blinov, Irina Romanova; Moskvo: Irina Gonĉarova, Aleksandr Basov, Aleksandra kaj Aleksej Panov, Nikolao Gudskov; Sankt-Peterburgo: Anatolo Sidorov, Svetlana Ejst. Mi pardonpetas, se ies nomojn mi ne notis. Refojan dankon al ĉiuj pro farita laboro! Multajn sukcesojn al viaj kluboj, grupoj kaj familioj! Espereble, la vizito de la francino iom vigligis vian aŭtunan vivon kaj agadon.

*Sv.Smetanina  
organizinto de la vojaĝo*



## Fransoazo en Barnaulo

Fama franca popol-muzika violonistino Françoise Noireau (kiu estas konata en la Esperanto-mondo kiel Fransoazo Oazo) vizitis nian urbon Barnaul' la 14-18-an de septembro 2018 kadre de ŝia rondvojaĝo tra nia vasta lando, dum kiu ŝi vizitis 8 urbojn (Barnaulo, Novosibirsko, Jekaterinburgo, Krasnojarsko, Kazano, Ĉeboksaro, Moskvo kaj Sankt-Peterburgo) kaj konatiĝis kun la urbaj E-kluboj kaj eĉ kun lokaj neesperantistaj popoloj.

En Barnaulon ŝi venis aviadile. La 14-an de septembro, vendrede, mi renkontis ŝin frumatene en la flughaveno, min akompanis unu el miaj filoj - Artur'; kaj dum nia aŭta reveno al nia hejmo, Fransoazo kaj Artur' jam sukcesis amikiĝi. Fransoazo gastis en nia loĝejo, en Esperanto-familio, kio ege ĝojigis ŝin. Certe, tio ne estis surprizo por ŝi, ĉar ni konatiĝis en la dissendo-listo de REFanoj - partoprenintoj de REF (Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj). Mi havas du filojn, Artur' (9 j.) kaj David' (14 j.), ambaŭ denaskuloj, kaj mia edzino Alona estas "eterna komencanto". Kiel ofte okazas, la patro (do mi) ĉiam parolas kun la infanoj nur en E-o, la patrino - nur en la loka lingvo (la rusa). Tio estas tipa situacio por E-familioj, tamen en la familio de Fransoazo mem estis iom aliel (ŝi rakontu pri tio aparte). Laŭ la ĉefa profesio Fransoazo estas instruisto kaj lerneja psikologiisto, do ŝi rapide trovis la aliron al la infanoj, kaj estiĝis vera amiko de tuta nia familio.

Ŝi havis longan flugon el Francio: tra Barcelono kaj Moskvo, do post tradicia rusa regalo per blinoj, ŝi fin-fine havis eblecon ripozi dum kelkaj horoj. Vespere ni organizis renkontiĝon kun la anoj de nia Barnaula E-klubo "Oazo", kaj Fransoazo amuzhumore rimarkis, ke ŝi havas la saman kromnomon en la Esperanto-mondo - Oazo. Ŝi rakontis pri sia vivo, pri la regionoj, kie ŝi loĝis, pri Esperanto-movado en Francio, kaj pri multegaj aferoj, grandaj kaj malgrandaj, gravaj kaj malgravaj, sed ĉiam interesege.

Vespere ni veturis iom eksterurban kaj vizitis la riverbordon. Nia rivero Obo tre plaĉis al Fransoazo, ŝi estis ravita per la pejzaĝo, kaj ripetis tion plurfoje. En Francio oni ja malofte havas eblecon vidi sovaĝan naturon.

Sekvan tagon, la 15-an de septembro, sabate, ni vizitis la mezlernejon, kie lernas miaj filoj. Estis organizita renkontiĝo kun 7-aj kaj 8-aj klasoj. En la koncerta halo Fransoazo rakontis al la lernejoj pri Esperanto, pri Francio, pri muziko, pri sia vivo... Ŝi rakontis pri diversaj regionoj de Francio, kie ŝi loĝis, kaj pri diversaj landoj, kie ŝi estis. Kaj ŝi aranĝis muzikan diven-ludon: ŝi violone plenumis tradiciajn popolajn melodiojn de diversaj landoj kaj regionoj, kaj la infanoj devis diveni, de kiu lando/regiono venas tiu muziko. En la fina parto la infanoj donis al ŝi multegajn demandojn pri diversegaj temoj. Videblis, ke por ili estas tre interese, la renkontiĝo vere plaĉis al ili.

Kompreneble, en la lernejo Fransoazo parolis esperante, kaj mi interpretis, do la infanoj (kaj instruistoj) vidis la praktikan uzadon de Esperanto per propraj okuloj. Certe, Fransoazo rakontis, ke ŝi vizitas nian landon dank' al Esperanto.

Poste ni eskuris tra la centro de la urbo kaj en la "malnova urbo". Vizitis diversajn vidindaĵojn, parkon, la region-historian muzeon. (Fakte, ni planis viziti tri muzeojn, sed sukcesis nur kun unu, ĉar por nia gastino ĉio estis interesa, do ni moviĝis pli malrapide, ol mi planis... Sed ni ne bedaŭras!).

Poste ni rapidis al la lekcio pri Esperanto... Temas pri tio, ke nia klubo planis organizi novajn E-kursojn, kiujn ni ne okazigis jam dum pluraj jaroj. Kaj la ĉi-taga lekcio devus servi kiel startigilo por la kursoj. Do, ni volis rakonti pri Esperanto, iom pri ĝia gramatiko, iom pri la historio, pri ĝiaj celoj kaj avantaĝoj, kaj registri homojn, dezirantajn lerni ĝin. Unu el la programeroj devus esti interparolo kun nia franca gastino (ankaŭ rakontoj de la malnovaj anoj de la klubo pri ilia event-riĉa esperanta vivo, pri vojaĝoj ktp). Anticipe en ĉiuj universitatoj kaj bibliotekoj de la urbo estis pendigitaj afiŝoj pri la lekcio, ankaŭ en la lokaj Interret-komunumoj estis disvastigita la informo. Ĉio ŝajnis esti bela en la planoj... Sed nin atendis fiasko! Ni ne povis supozi, ke al la lekcio venos nur unu nova homo! Nur unu... Nu, kion fari? Certe, ni rakontis al li pri E-o, eĉ aranĝis la unuan lecionon kaj donis la lernolibron. Li diris, ke deziras lerni la lingvon, kaj ni certe helpas al li. Sed sendube, ni spertis grandan seniluziigon. Kian eraron ni faris, organizante tiun lecionon? Ni ankoraŭ devas analizi.

Nu, ĉar ni subite ekhavis liberan vesperon, ni decidis daŭrigi nian ekskurson en la urbocentro, kaj piediris al la urba parto de la riverbordo kaj al la haveno kun la Rivera Stacidomo. Vespere, post la malheliĝo, tie estas tre bele.

La sekva tago, dimanĉo, la 16-a de septembro, estis dediĉita al longa aŭta vojaĝo al la Montara Altaĵo. Laŭ la vojo ni vizitis la muzeon de la dua en la mondo kosmonaŭto German Titov, kiu naskiĝis kaj kreskis en Altaĵo, kaj kies patro estis instruisto kaj esperantisto (en la muzeo eĉ kuŝas lia esperanto-rusa vortaro (bedaŭrinde, ne ĉiam eksponata, pro manko de spaco)). Veturante laŭ la Ĉuja ŝoseo (Ĉujskij trakt), ni vizitis urbon Bijsk' kaj faman ripozlokon Belokuriĥa kun multaj sanatorioj kaj kuracstacioj. Tie ni telfere supreniĝis al la pinto de monto Cerkovka, kaj vespere gaste vizitis la familion de famaj forĝistoj Bileckij, kie ne nur la ambaŭ gepatroj, sed ankaŭ la filino estas veraj majstroj de tiu ĉi malfacila sed bela metio.

En Barnaulon ni revenis malfrue, postnoktomeze, do tutan matenon de la sekva tago ni dormis.

Tamen en la dua duono de la tago (lundo, la 17-a) ni vizitis la muzikan lernejon, kiun frekventas mia malpliaga filo. Tie estis organizita renkontiĝo kun infanoj de 6 ĝis 14 jaroj, iliaj instruistoj kaj gepatroj. Denove, kiel en la mezlernejo, Fransoazo rakontis pri Esperanto, pri sia vivo, pri diversaj regionoj de Francio... sed plejparte pri tio, kiel ŝi venis al popola muziko, al violono, al dancoj, kiel oni lernas la popolan muzikon (kompare kun la "akademia" muziko de muziklernejoj), kiel diferencas la kulturojn en diversaj regionoj, kaj kiel Esperanto helpas al ŝi vojaĝi tra diversaj landoj. Ŝi ne nur aranĝis sian muzikan diven-ludon, sed ankaŭ dancigis la infanojn, instruis al ili kelkajn movojn kaj ludis kun ili. Certe, en la fino la demandoj abundis. Unu malgranda knabino neniel povis disiĝi kun Fransoazo... kaj ne volis kredi, ke ni parolas Esperanton, sed ne la francan!

La 18-an, marde, ni elveturis frue por veturigi Fransoazon al Novosibirsko, kie ŝi daŭrigos sian vojaĝon. Ni interkonsentis kun Katerina Arbekova (konata novosibirska aktivulo, ankaŭ ŝia filino parolas Esperanton) renkontiĝi ĉe ŝia hejmo tagmeze, sed iom malfruiĝis pro multaj riparlaboroj de la ŝoseo, renkontitaj dum la vojo. Tamen, ĉio estis en ordo. Katka renkontis nin gastame, regalis per bongusta tagmango, kaj mi lasis en ŝiaj manoj Fransoazon, kiu fariĝis kara por tuta nia familio dum la pasintaj kelkaj tagoj...

Kiel estas konate, Fransoazo vizitis ankoraŭ kelkajn urbojn de nia lando (kaj tieajn klubojn) dum sia turneo (en Moskvo ŝi eĉ donis [video-intervjuon](#)), kaj nun ŝi jam estas hejme, en Francio.

Venu refoje, Fransoazo!

*Ikar kaj Alona Akimenko*

## Fransoazo Noireau en Jekaterinburgo

La 21-n – estis la renkonto de Fransoazo Noireau ĉe la trajno, post la kelkhora ripozo en la hejmo de Raja okazis promenado tra la urbocentro kaj konatiĝo kun Jekaterinburgo (gvidis Raja). Montritaj urbaj vidindaĵoj: Katedralo sur la sango kaj apuda skvaro, kinokonzertejo "Kosmo", literatura kvartalo kaj monumento al A. S. Puŝkin, la urbaj teatroj (opera kaj de muzika komedio) kaj filharmonio, vespera promenado laŭ la kajo de la rivero Isetj kaj fotiĝo ĉe la iama Domo de Paco kaj Amikeco (nuna prezidenta akceptejo en Jekaterinburgo), promenado al la placo de la 1905-a jaro kaj Urba Domo.

La 22-n de septembro – renkontiĝo de Fransoazo kun interesiĝantoj pri la franca lingvo kaj kulturo en la urba biblioteko, salono de la fremdlingva literaturo. Ĉeestis studentoj de la jekaterinburga ŝtata universitato kaj membroj de la societo "Amikoj de Francio" – entute ĉirkaŭ 25 homoj, kaj 2 esperantistoj: Sergej Kumkov kaj Raja Kudrjavceva. Organizis la renkontiĝon Natalija Fadejeva (gvidantino de la societo "Amikoj de Francio") kaj Raja Kudrjavceva, kiu atentigis la ĉeestintojn ke ŝi prezentas la uralan regionan Esperanto - movadon kaj rakontis, ke la franca amikino havas rondvojaĝon tra Rusio laŭ invito de REU kaj Jekaterinburgo estas la tria urbo el ok entute vizitotoj de Fransoazo.

Fransoazo rakontis al la kunvenintoj iom pri sia vivo kaj por- kaj perEsperanto – agado, disdonis la paperfoliojn kun la tajpita sur ili teksto en la franca kaj samtempe en Esperanto, kaj proponis kompari ilin kaj pruvigi kiom la lasta estas ja pli facila. Kaj fine de la teksto estis proponita la tasko por respondi en la franca lingvo kion ili komprenis pri Esperanto. Mi menciu, ke sur tiuj paperfolioj ni lasis ankaŭ telefonkontaktojn de jekaterinburgaj esperantistoj, kaze se aperos demandoj, ligitaj kun Esperanto. Post tio Fransoazo, ankaŭ rakontis pri sia violonludado, pri la koncerto "Violono de la mondo" kaj ludis por ĉiuj la "Francan valson". La publiko, precipe la gvidantino de la societo "Amikoj de Francio", restis kontentaj kaj donacis al Fransoazo sonorileton memore pri la renkontiĝo. Post kelkaj tagoj de la renkontiĝo mi ricevis de Natalija Fadejeva retleteron kun la fotoj, faritaj dum la aranĝo, en kiu ŝi skribis, ke membroj de la societo "Amikoj de Francio" varme rememoras Françoise kaj dankas min pro la renkontiĝo kun la bonega homo!

Post la tagmanĝo en la kafejo, okazis vizito de la muzeo de historio de Jekaterinburgo, ekskurso tra la muzeo, vizito de la nova ekspozicio tie kaj de la montrofeneŝtro, dediĉita al Esperanto kaj esperantoido – lingvo Omo, kies aŭtoro estis jekaterinburgano Vengerov. La ekskurson en la muzeo partoprenis krom Francoise 12 jekaterinburgaj esperantistoj kaj la pranepino de Vengerov. La ekskurson organizis, laŭ la peto de R. Kudrjavecva, estrino de la fako de muzea turismo Ĥajrutdinova Svetlana Aleksandrovna.

Post la vizito de la muzeo, vespere, okazis la esperantista kunveno, dum kiu kun la franca gastino renkontiĝis jekaterinburgaj esperantistoj kaj ankaŭ du esperantistoj, venintaj el la najbaraj urboj de la Sverdlovska provinco (Dmitrij Rzmanin el u. Revda kaj Anastasija Zalogina el Verĥnjaja Piŝma). La programo de la kunveno konsistis el la konatiĝo kun Fransoazo, konversacio pri la temo de Esperanto – edukado en esperantistaj familioj kaj poste Francoise kun la kolora mapo de Francio prezentis kvin regionojn de la lando, en kiuj ŝi iam vivis, kaj violonludis popularajn dancajn melodiojn de tiuj regionoj, montris nekomplikajn dancajn movojn de unu el la popola franca danco kaj invitis la dezirantojn iom moviĝi kaj provi danci. Fine ŝi prezentis sian koncertan programon, kiu nomiĝas “Violono de la mondo”, kiu konsistas el melodioj de diversaj landoj kaj proponis al la ĉeestintoj diveni al kiuj landoj kaj kulturoj ili apartenas. Estis vere agrabla ĉi tiu aŭtuna kunveno!

La 23-n de septembro estis ekskursita tago por nia gastino kaj ni eksterubiĝis. La profesia ĉiĉeronino – esperantistino Rita Husanova per la propra aŭto veturigis Francoise kaj min komence al la limo inter Eŭropo kaj Azio, kie ni fotiĝis kaj filmis violonludadon de Francoise ĉe la montrilo “ Parizo 4700 “ (la distanco de tiu loko ĝis Parizo). Laŭvoje al la limo ni vizitis la memorejon al la viktimoj de la stalinismo kaj vidis tie relative antaŭnelonge aperintan skulptaĵon de la skulptisto Ernst Neizvestnij. Post la vizito de la limo, ni veturis al la urbo Pervouralsko, montrante al Francoise uralan naturon kaj vilaĝojn kun belaj koloraj lignaj domoj kun tradiciaj rusaj fenestrokadroj, poste ekskursis en la tute freŝmalfermita moderna kleriga centro, kie vidis du muzeojn, rekte ligitajn kun Uralo : unu pri la historio de mina kaj metalurgia industrio en Uralo, alia – granda privata kolekto de belegaj uralaj ŝtonoj. Revenante ni faris paŭzon kaj havis malgrandan romantikan piknikon en la aŭtuna arbaro. La tutan ekskurson organizis jekaterinburga esperantistino Rita Husanova

Reveninte en la urbon, nia triopo vespermanĝis en la kafejo proksime al la stacidomo kaj poste ni akompanis Francoise al ŝia trajno al Krasnojarsko, kiu forveturis la 23-n je la 22.05 laŭ la loka tempo.

Raja Kudrjavecva

**27.09**  
**18:00**  
3-й этаж, выставочный зал

**Встреча с французским педагогом Франсуазой Нуаро**

В программе:  
- 17:00-18:00 свободное общение с педагогом  
- мастер-класс по разговору на асфальте  
- ролевая игра  
- мини-концерт

Вход свободный. Встреча будет интересна тем, кто хочет узнать больше о французском языке и Esperanto.

Одна литература на тысяч народов мира. 3 этаж, ауд. 3-14  
Тел.: 2-11-15-36, внутр. тел. 1-13,  
e-mail: info@yandex.ru  
Марко Шпегл, e-mail:  
yoshikidmitan@yandex.ru  
Бюджетная  
универсальная  
научная библиотека  
Красноярского края

## Fransoazo Noireau en Krasnojarsk

Fransoazo venis en Krasnojarskon 25-an de septembro je la 14 horoj laŭ loka tempo. Krasnojarskanoj ŝin renkontis kaj venigis en la klubejon, kie ŝi loĝis dum tuta periodo de la gastado. Samvespere en la klubejo okazis interkona vespero kun parta prezento de ŝia programo. Venis ĉirkaŭ dek klubaj geaktivuloj. Fransoazo rakontis pri Francio, ludis violonon kaj montris naciajn dancojn. Sekvontage, la 26-an, nia franca gastino kun Evelina kaj Jelena ekskursis tra la urbo, vizitante la faman kapelon de Paraskeva-Pjaticna kaj promeninte laŭ kajo de Jeniseo en centre de la urbo. En dua duono de la tago Noireas vizitis kaj prezentis sian programon en liceo №9, antaŭ la geleernantoj. Abundis geknaboj kaj amasis demandoj pri Esperanto, Francio kaj muziko. Tradukis en la rusan Evelina Sokolova. Vespere okazis vizito de Granda Koncerta Halo (БКЗ), ŝi spektis koncerton de fama krasnojarska dancensemblo "Jenisejskije zori". Vesperumis nia francino en la klubejo kun kelkaj niaj geklubanoj. La 27-an La gastingon akompanis tra la urbo Marina Bac ĝis la biblioteka aranĝo. Ili promenis en la centro ka vizitis kafejon "Bulgakov". Je la 17-a horo komenciĝis la publika prelego kaj koncerteto de Francoise en Ŝtata universala scienca biblioteko de Krasnojarska regiono (ГУНБ), kiun vizitis ĉirkaŭ 30 homoj - ekstera publiko kaj krasnojarskaj geesperantistoj. Interpretis paroladon de



Noireau en la rusan Sergej Ĵilejkin kaj Vladimir Sapojnikov. La lastan tagon (28-an de septembro), antaŭ la forveturo la gastingon ni konatigis kun Akademia urbeto kaj vira monaĥejo, pitoreske situantaj surborde de Jeniseo. Ni akompanis Fransoazon ĝis kaj de la fervoja stacidomo Krasnojarsk, ambaŭflanke sopirantaj kaj esperantaj je baldaŭaj estontaj renkontoj. Kaj la espero estis nesenbaza - nia Fransoazo Oazo revenos al ni antaŭnovjare!

Vladimir Sapojnikov

## Pretu por novaj aranĝoj

### TIĤVINAJ ESPERANTO METIEJOJ -2019

Funkcias la retejo de TEM-oj - 2019. La adreso de la retejo: <http://temoj2019.online/>

Tie vi povas aliĝi kaj ricevi bazajn informojn pri la aranĝo. Iom poste aperos tie ankaŭ fotaro de la antaŭaj renkontiĝoj.

Pliaj gravaj informoj (alven-eblecoj ktp) estos sendataj nur al la aliĝintoj.

Bonvenon!

Mikaelo Bronŝtejn

## Ni atendas viajn opiniojn!

Aperis la ideo, ke nia “Bulteno” fakte estas io pli ol simpla bulteno, sed fariĝis kvankam malgranda, tamen revuo. Tial ĝi meritas havi specialan propran nomon (eble, kun subtitolo “Bulteno de REU”).

Tial ni petas esprimi viajn opiniojn, ĉu vere indas doni al BdR novan nomon, kaj se jes, kiun nomon vi proponas?

Ni petas sendi viajn ĉi-tamajn ideojn al la adreso [nikolao@yandex.ru](mailto:nikolao@yandex.ru) kun la indiko de la temo “Nova nomo”.

La red.

**Bulteno de REU (BdR) estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo “RUSIA ESPERANTISTA UNIO”**  
BdR atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov [nikolao@yandex.ru](mailto:nikolao@yandex.ru) aŭ (kaj) Svetlana Smetanina [svsmetanina@yandex.ru](mailto:svsmetanina@yandex.ru)

Estraro de Rusia Esperantista Unio